


ESPERANTO

REVUO INTERNACIA



N-ro 642 (5)

Majo 1959



Lamenhof-Jaro

**Universala
Esperanto-Asocio**

(En Konsultaj Rilatoj kun
U.N.E.S.C.O.)

esperanto

M A J O 1959

52 a J A R O

REVUO INTERNACIA N-RO 642 (5)

Fondinto : H. HODLER

Honora Redaktoro : HANS JAKOB

Ĉion por la redakcio oni sendu al la Redaktorino :
S-ino Kirsten Zacho, Randbølvej 4, København, Danlando.

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la revuo Esperanto
(abonado, reklamoj, anoncetoj) sendu al UNIVERSALA
ESPERANTO-ASOCIO, Eendrachtsweg 7, Rotterdam-C.,
Nederlando. Telefono : Rotterdam 128313. Ĝirkonto : 378964

Ĉiu materialo por difinita numero devas atingi respektive
la redakcion aŭ la Centran Oficejon (vidu supre) **antaŭ**
la 1-a de la antaŭa monato.

Bankisto de U.E.A. :

R. Mees & Zoonen, Blaak 10, Rotterdam-C.

Traduko kaj represo de artikoloj estas permesataj,
kondiĉe ke oni citu la fonton. Oni sendu tian represaĵon
al nia redakcio.

Jara abono (1959) : 9,50 n.gld. (kun membreco kaj jarlibro
12,50 n.gld.). Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj.

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo 128,— gld $\frac{1}{2}$ paĝo 64,— gld $\frac{1}{4}$ paĝo 32,— gld
 $\frac{1}{8}$ paĝo 16,— gld $\frac{1}{16}$ paĝo 8,— gld

Anoncetoj pri korespondado :

0,15 gld por unu vorto aŭ 1 int. respondkupono por ĉiu
duo da vortoj.

Legantoj en 80 landoj.

Estraro de U.E.A. :

Prof. D-ro Giorgio Canuto, prezidanto, Via Chiabrera 37,
Torino.

Prof. D-ro Ivo Lapenna, ĝenerala sekretario, 77, Grasmere
Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo.

H. W. Holmes, O.B.E., vic-prezidanto, 38, Fillebrook Road,
London E 11, Britujo.

R. Llech-Walter, estrarano pri financoj, 5 Quai Vauban,
Perpignan (Pyr. Or.), Francujo.

D-ro Ing. Giordano Azzi, estrarano pri kulturaj aferoj,
viale Giulio Cesare 20, Como, Italujo.

D-ro W. Herrmann, estrarano pri landaj kaj fakaj asocioj,
Bürstädterstr. 3, (16) Lampertheim-Hessen, Germanujo.

Centro de Esploro kaj Dokumentado

77, Grasmere Avenue, Wembley, Middlesex, Britujo,
Telefono : ARNold 90-81.

Serva Centro, Palais Wilson Genève. Svislando.

Honora Administranto : Hans Jakob. Telef. 32.30.34.

LA FRONTPAĜA BILDO PREZENTAS :

Busto de Zamenhof, mendebla ĉe Milana Grupo
Esperantista, Piazza Oberdan 1, Milano, Italujo.

Enhavo

Decidoj de la printempa kunsido	81
Donaco Maillard	81
Inaŭguro de la Zamenhof-Jaro Rotterdam	82
Oratora Konkurso	82
Zamenhof kaj la Movado	83
Baza Dokumento	86
La Voĉo de Zamenhof	87
Postkongresa urbo — Krakovo	88
"Leono de Fortepiano"	90
Seminario por Ĉe-metodaj instruistoj	97
Survoje al la miliono	99
Frostavallen	99

Rubrikoj :

La Magnetofona Servo de UEA	85
Okaze de la Zamenhof-jaro	86
La juna Vivo	89
Belartaj Konkursoj	92
Novaj Libroj	95
44-a Universala Kongreso	96
Tra la Mondo	97
Radio-Babiloj	98
La internaciaj Konkursoj	98
Esperantista Vivo & Nekrologo	99
Radio	99
Oficiala Informilo	99

Manuskriptoj por "Esperanto" estu liveritaj al la
redakcio en du ekzempleroj. Ili devas esti klare
tajpitaj en perfekta Esperanto. Oni skribu sur nur
unu flanko de la papero (prefere en normformato
A4), kun interlinia spaco kaj kun tre larĝa margeno
maldekstre por redakciaj instrukcioj al la presisto.
Supersignitaj literoj devas havi la ĝustajn super-
signojn, se necese permane aldonitajn. Neuzotajn
manuskriptojn oni resendas nur kontraŭ afranko
aŭ respondkupono.

OFICIALA ORGANO DE UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(EN KONSULTAJ RILATOJ KUN U.N.E.S.C.O.)

Decidoj de la printempa kunsido de la Estraro

Donaco Maillard al la Fondaĵo - Zamenhof

De la 3-a ĝis la 5-a de aprilo okazis en la Centra Oficejo de U.E.A. en Rotterdam la kutima printempa kunsido de la estraro. Ĉeestis la prezidanto, Prof. G. Canuto, la vic-prezidanto, S-ro H. W. Holmes, la Ĝenerala Sekretario, Prof. I. Lapenna kaj la Estraranoj D-ro W. Herrmann kaj S-ro R. Llech Walter; krome la direktorino F-ino M. Vermaas, kaj la redaktorino S-ino K. Zacho. La kunsidoj entute daŭris 21 horojn, kio ebligis profundan pritrakton de la abunda tagordo.

Ne estas eble prezenti ĉiujn decidojn, sed estas utile informi la membraron almenaŭ pri la plej gravaj:

Ĉar la estraro estas en daŭra kontakto dum la tuta jaro, kaj urĝaj decidoj estas farataj skribe, antaŭ ĉio estis resumitaj la decidoj de la estraro inter la kunsidoj de Mainz kaj la nuna. Surbaze de la raportoj de la estraranoj kaj aliaj funkciuloj de la Asocio, la Ĝenerala sekretario kunmetis la Raporton de la Estraro por la laborjaro 1958-59. La Raporto estis detale ekzamenita ĉapitron post ĉapitro kaj, post kelkaj aldonoj, ĝia definitiva teksto estis aprobita. Kiel kutime, la Raporto estos presita, distribuita al ĉiuj kongresanoj en Varsovio kaj publikigita en la Jarlibro. La estraro opinias, ke estus tre utile, se ĉiuj membroj atente tralegus la jarraportojn de la estraro. Tio ebligus pli bonan komprenon de la agado kaj de la malfacilaĵoj renkontataj, kio siavice helpus al pli efika laboro. Aparta atento estis dediĉita al la financoj. La pasintan jaron estis preskaŭ evitita deficino; la jaro 1958 finiĝis sen deficino. La estraro kun plezuro konstatis, ke tio okazis la unuan fojon post multaj jaroj, eble eĉ en la historio de U.E.A. La altigo de la kotizoj kaŭzis ioman malgrandigon de la nombro de individuaj membroj, sed tute ne malgrandigon de 10%, kiel la estraro antaŭvidis proponante la buĝeton 1958 kun la altigitaj kotizoj. Tamen, estas necese akcenti, ke la ekvilibro povis esti atingita nur dank'al senfina sindediĉo de la geoficistoj kaj libervolaj helpantoj en la C.O., kiuj ĉiutage, ofte inkluzive sabatojn kaj dimanĉojn, laboras ekster la laborhoroj. La estraro esprimas tutkoran dankon al ĉiuj laborantoj en la C.O. kaj al ĉiuj aliaj kunlaborantoj en diversaj branĉoj pro ilia sindona agado por la Asocio kaj por la Movado ĝenerale. La propono de buĝeto por 1960, prezentota al la Komitato, antaŭvidas elspezojn de 100.088 gld., kio ne inkluzivas la diversajn specialajn kontojn, kiel ekz. tiun de C.E.D., aŭ la propagandan. La buĝeto de C.E.D. estas antaŭvidita en alteco de £ 750. La libroservo funkcias bonege, kaj ankaŭ la financa efiko estas tre kontentiga. La eldonaĵoj de U.E.A. vendiĝas bone.

La estraro aprobis, post kelkaj ŝanĝoj kaj aldonoj, la programon de la 44-U.K. en Varsovio. Estas aprobita ankaŭ la programo de la I.S.U. en Varsovio (9 prelegoj). Jam la pasintan jaron estis principe decidite, ke la U.K. en 1960 okazu en Bruselo. Nun Bruselo estas definitive akceptita kiel kongresurbo por tiu jaro. Por la jaro 1961 du urboj interesiĝas: Zürich kaj Madrid. La estraro kun simpatio rilatas al ambaŭ provizoraj invitoj, sed atendas unue konkretan proponon en la senco kaj laŭ la kondiĉoj de la Kongresa Regularo. La estraro same tiel kun granda apogo pretas pritrakti la sugeston de kelkaj japanaj esperantistoj, ke la U.K. en 1965 okazu en Tokio. Ankaŭ tiurilate estas necese atendi formalan proponon, kiu verŝajne venos jam en tiu ĉi jaro.

La estraro esprimis sian ĝeneralan kontenton rilate la redaktadon

D-ro G. Maillard el Bourg-la-Reine (Francujo), unu el la plej malnovaj kaj plej fidelaj pioniroj de Esperanto, donacis al la Fondaĵo-Zamenhof, tuj post la unua alvoko, la sumon de 20.000 fr.fr. Nun li disponigis al la Fondaĵo-Zamenhof pliajn 100.000 fr.fr., sed li esprimis la deziron, ke tiu sumo estu utiligata speciale por la disvastigo de la Internacia Lingvo inter la junularo, precipe inter la studentaro. Li petis la ĝeneralan sekretarion interkonsiliĝi kun la funkciuloj de la esperantista junularo kaj kun la estraranoj de U.E.A. rilate la plej efikan uzon de tiu mono.

La estraro pritraktis la aferon dum la printempa kunsido kaj unuavice decidis esprimi al D-ro G. Maillard publike tutkoran dankon pro lia nobla granda donaco. Plenumante la deziron de la donacinto, konforme ankaŭ al la opinio de la konsultitaj funkciuloj de T.E.J.O., la estraro sugestis, ke la tuta sumo de 100.000 fr.fr. estu utiligata jene: 20.000 fr.fr., donacitaj antaŭe, restu en la ĝenerala kazo de la Zamenhof-Fondaĵo; 20.000 fr.fr. estu por la Oratora Konkurso en Varsovio (1-a premio 10.000 fr.fr., 2-a premio 6.000 fr.fr., 3-a premio 4.000 fr.fr.); 10.000 fr.fr. estu je dispono de la Infana Kongreseto en Varsovio por premioj al infanoj laŭ la decido de la organizantoj; 20.000 fr.fr. estu disponigitaj al la kunveno de T.E.J.O. en Gdansk por konkursoj laŭ la decido de la estraro de T.E.J.O.; 50.000 fr.fr. estu uzataj por taŭga plurlingva flugfolio speciale dediĉita al la studenta junularo kaj subskribita de universitataj profesoroj de diversaj landoj (teknike prizorgota de la estraro de T.E.J.O.). La estraro opinias, ke tiamaniere la donaco de D-ro Maillard estos plej efike utiligata.

La kontribuo de D-ro Maillard al la Fondaĵo-Zamenhof kun mencio de speciala celo, por kiu ĝi estu uzata, instigis la estraron fari principan decidon: persono aŭ organizaĵo, kiu donacas al la Fondaĵo-Zamenhof sumon de minimume 1000 ned. gld., aŭ proksimuma egalvaloro en aliaj valutoj, rajtas postuli, ke tiu sumo estu uzata por specialaj celoj, se tiuj celoj ĝenerale respondas al la celoj kaj intereso de la Esperanto-Movado. La estraro tamen esperas, ke, kiel en la kazo de D-ro Maillard, la donacantoj interkonsiliĝos kun la estraro pri la celo kaj maniero de uzo de la donaco.

La donaco de D-ro G. Maillard signifas grandan altigon de la Fondaĵo-Zamenhof. Bonstataj esperantistoj, komprenantaj la gravecon de almenaŭ minimumaj financaj rimedoj kiel materia antaŭkondiĉo por plua disvastigo de la lingvo, tute certe pripensos la geston de D-ro Maillard kaj konsideros siajn proprajn eblecojn kon-

de la oficiala organo. Ĝi konsilis al la redaktorino dediĉi pli da atento al la rubriko "Tra la Mondo", por ke tiu rubriko pli fidele respegulu la progresadon de la lingvo en diversaj mondopartoj. Estas ankaŭ tre dezirinde havigi pli da kontribuoj el Azio kaj aliaj ne-eŭropaj landoj. U.E.A. estas tutmonda organizaĵo kaj en ĝia organo devas esprimiĝi la universaleco de la Asocio. La unua numero de Belarto vendiĝis ĝis nun en 1500 ekzempleroj, sed restas ankoraŭ sufiĉe granda kvanto. Pro la daŭra valoro de la kajero, certe ankaŭ la resto estos vendita en la sekvantaj monatoj. La dua numero aperos en 1960.

La agado de S-ino M. Haudebine en Hindujo donas kontentigajn rezultojn kaj la estraro decidis esprimi al ŝi dankon pro ŝia efika kaj sindona laboro. Estas ankaŭ decidite doni al ŝi plian malgrandan materian helpon. Komitatano T. Sekelj deklaris, ke li estas preta veturi al Afriko fine de tiu ĉi jaro por disvastigi la lingvon sur tiu kontinento, precipe en Gano kaj Gineo. La propono estas akceptita. Pri subvencio decidis la nova estraro, elektota en Varsovio.

Rilate la sekvantajn eldonaĵojn de la Asocio estas decidite, ke principe U.E.A. specialiĝu en eldonado de antologioj. Se troviĝos la necesaj financaj rimedoj, C.E.D. eldonos en tiu ĉi jaro aŭ komence de la sekvanta la biografion de D-ro L. L. Zamenhof, kiun verkis Marjorie Boulton. La Jarlibro 1959 aperos post kelkaj tagoj. La materialo ĉi-jare estas tiel abunda, ke la Jarlibro havas 544 paĝojn. La grandeco de la eldonaĵo kaŭzis la prokrastiĝon de la publikigo.

La aliaj decidoj de la estraro rilatas al heredaĵoj, donacoj, intensigo de la kampanjo por apogantoj, elektoj de la Komitato kaj aliaj organoj aŭ funkciuloj, transporto de la biblioteko el Ĝenevo al Rotterdam, lerneja kampanjo, rilatoj kun UNESKO, U.N. kaj aliaj organizaĵoj, Eŭropa lingvo-kampanjo, ekzamena komisiono, prelegvojagoj, diversaj proponoj de la membroj. Speciala atento estis dediĉita al la laboro de C.E.D., kies agado daŭre donas tre fortan helpon al korekta takso de la valoro de la Internacia Lingvo en diversaj internaciaj organizaĵoj, institucioj kaj institutoj.

Kompreneble, la estraro plej detale ekzamenis la progresadon de la laboroj en diversaj landoj kaj medioj okaze de la Zamenhof-Jaro. Ĝi konstatis, ke la centraj organoj de la Movado precize plenumis kaj plenumas la taskojn, kiuj, laŭ la Baza Programo, apartenas al ili. Ĝi decidis direkti insistan peton al ĉiuj landaj asocioj, lokaj grupoj kaj unuopuloj fari sian devon en la senco de la Baza Programo. Tute speciale la Estraro turnas sin al ĉiu unuopa esperantisto kun la alvoko kontribui finance al la Fondaĵo-Zamenhof. La estraro akcentas ankoraŭfoje, ke la omaĝo al la aŭtoro de Esperanto devas esti afero de la tuta kultura mondo kaj ne nur de la Esperanto-organizaĵoj. Plue, la Zamenhof-Jaro devas esti utiligata por impona disvastigo de la lingvo kaj fortikigo de ĉiuj Esperanto-organizaĵoj, tiel ke tuj en 1960 oni povu komenci novan etapon, kiu signifos multe pli vastan utiligon de la lingvo en la praktiko de ĉiaspecaj internaciaj rilatoj.

I. L.

tribui en simila formo al la Fondaĵo, dediĉita al la memoro de D-ro L. L. Zamenhof por plia disvastigo de lia verko.
D-ro Ivo Lapenna

Inaŭguro de la Zamenhof-Jaro en Rotterdam

En Rotterdam, la kunlaborkomitato de ĉiuj tieaj Esperanto-Societoj, komprenis eluzi la avantaĝon, ke la Estraro de U.E.A. kiel kutime havis sian printempan kunsidon tie. Estis aranĝitaj 2 kunvenoj. La unua okazis sabate la 4-an de aprilo, kaj ĝi estis nur por esperantistoj. Ĉeestis proksimume 200 personoj, kiuj ĉiuj — laŭ la aplaŭdo — ĝuis la allogan programon. Unue parolis mallonge la estraranoj de U.E.A. Prof. G. Canuto pri la Zamenhof-Jaro ĝenerale, D-ro W. Herrmann pri la enketo inter urbestroj, S-ro W. Holmes O.B.E. pri C.E.D. kaj S-ro R. Llech-Walter pri la financoj de la Movado. Prof. I. Lapenna per la ĉefprelego: "La sekvonta etapo de la Esperanto-Movado, post la Zamenhof-Jaro" finis la vesperon. Tre inspire kaj vigle Prof. Lapenna parolis, kaj certe multaj forlasis la salonon plenplenaj de energio por labori por Esperanto. Oni surben digis ĉiujn paroladojn.

La dua kunveno okazis lunde la 6-an de aprilo kaj estis por neesperantistoj. La urbestro de Rotterdam Mag. G. E. van Walsum, estis honora prezidanto, kaj Prof. Dr. J. Prins, profesoro en la universitato de Utrecht, prezidis la kunvenon. La prelegantoj estis Prof. D-ro I. Lapenna kaj Prof. D-ro G. Canuto. Ili parolis resp. pri la lingva problemo en la internaciaj rilatoj kaj pri la uzado de la Internacia Lingvo en la scienco. Ambaŭ prelegojn tradukis F-ino Vermaas Kunlaboris ankaŭ lertaj kantistino kaj pianisto. Entute ĉeestis proks. 150 personoj, kaj inter ili estis kelkaj elstaraj personoj, ekz. ŝtata kaj komunuma inspektoroj de instruado, kaj pluraj reprezentantoj de la loka kultura vivo.

Okazis gazetara kunsido en la eleganta Park-Hotelo, kie ĉeestis reprezentantoj de la 7 ĉefaj lokaj gazetoj. ĈIUJ poste tre favore priskribis Esperanton kaj la Zamenhof-Jaron. Gratulindaj estis la iniciatantoj en Rotterdam kaj speciale ni gratulas la prezidantinon de la Roterdama Esp. Komitato, F-inon Vermaas pro la vere grandskalaj aranĝoj.

K.Z.

ORATORA KONKURSO 1959

Laŭ la Regularo pri la Oratoraj Konkursoj, la estraro decidis, ke la temo de la Oratora Konkurso, okazonta dum la U.K. en Varsovio, estu: "La Personeco de D-ro L. L. Zamenhof". La konkursantoj pritraktos la temon el sia propra vidpunkto, nome devos prezenti kiel la personeco de D-ro L. L. Zamenhof influis aŭ impresis ilin mem. Por la ĉi-jara konkurso D-ro G. Maillard donacis la sumon de 20.000 fr.fr., kaj la estraro decidis, ke la

unua premio estu 10.000 fr., la dua 6.000 kaj la tria 4.000.

La estraro alvokas la junularon multnombre partopreni en la ĉijara Oratora Konkurso. Rajtas partopreni gejunuloj aĝaj maksimume 25-jaraj. La komisiono estos nomita de la estraro antaŭ la komenciĝo de la konkurso. La gejunuloj dezirantaj partopreni anoncu sin kiel eble plej baldaŭ al la L.K.K. de la 44-a U.K. en Varsovio.

Zamenhof kaj la Movado(*)

Sinjoro Prezidanto, karaj gekunvenintoj !

En mi animiĝas kune sentoj de persona feliĉo, admiro kaj honoro pro la privilegiaj cirkonstancoj, kiuj kondukis min al Varsovio. En tiu ĉi mirinda lando — kiu kontribuis al la tutmonda kulturo per siaj noblaj verkistoj, poetoj kaj komponistoj — meze de ĉi kuraĝa popolo, — kiun sklavigado, turmentoj kaj tiraneco igis pli kaj pli spirite kohera —, inter la muroj de tiu ĉi Urbo — eterna, ĉar ĝi postvivis sian propran morton — mi ne pasas kiel rapidema vizitanto, sed tie ĉi mi vivas kaj laboras, kvazaŭ civitano inter civitanoj. En miaj pli fruaj jaroj mi neniam aŭdacus reveni, ke iam en mia vivo mi havos okazon koni ĝis identiĝo kun ĝi la landon, kiu naskis la aŭtoron de la Internacia Lingvo. Kvankam Esperanto estas frukto de unu granda intelekto, tamen ĝi neniam estus naskiĝinta, se Pollando ne estus doninta ne nur la Homon, sed ankaŭ la historiajn kondiĉojn, kiuj inspiris lin.

Vi scias, ke jam dum la vivo de Zamenhof oni klopodis kaŝi lian gentan originon : kvazaŭ abdiko al la regno de antaŭjuĝoj licus al homoj, kiuj predikas fratecon. Ni rajtas fieri, ke Zamenhof apartenis al tiu malfeliĉa gento, kiun jarcentaj humiligoj kaj senlimaj turmentoj silente nobligis. Ni rajtas fieri, ĉar lia hebreeco, la Kalvario de la hebrea popolo en la geto, estas la fundamenta inspiro, kiun Zamenhof sublimigis, per granda humilo de protesto kontraŭ la homa kondiĉo, je himno al humana frateco.

Du tendencoj

Por kompreni la personecon de Zamenhof, oni devas distingi en lia karaktero du kontraŭajn tendencojn, kiuj daŭre bataladis inter si. De unu flanko lin pelis al altaj faroj granda idealismo kaj profunda kredo je la bono de la homa koro. De alia flanko fera malvarma racio kaj neŝanceliĝebla logiko kontrolis kaj modifis ĉiun lian impulson, tiel ke hodiaŭ ni ne trovas agon en lia tuta vivo, nek vorton en lia plena verkaro, kiu ne estis atente pesata kaj kribrita tra prudenta analizo. Nur homo kun granda morala supereco povis ne esti disŝirita de tiaj diverĝaj tendencoj, sed male superregi kaj harmoniigi ilin.

Kiel idealisto, Zamenhof ekde la junaĝo estis profunde impresita de la batalado inter popoloj de diversaj nacioj. Li supozis, ke du estas la kaŭzoj de la konfliktoj inter la homoj: lingvoj kaj religioj. Li ne povis stati inerta antaŭ spektaklo de sanganta homaro kaj ellaboris du planojn, kiuj — tamen respektante la lingvojn kaj religiojn — donu al la homoj la eblecon renkontiĝi kaj toleri sin reciproke sur neŭtrala tereno. La unua plano

nomiĝis Esperanto kaj rapide disvastiĝis tra la tuta terglobo. La dua nomiĝis "homaranismo" aŭ "hilelismo" kaj ne sukcesis kolekti adeptojn. Al tiuj du idealoj, kiuj en lia menso kompletigis unu la alian, sed kiujn en la publika aktivado li nete dividis unu de la alia, Zamenhof dediĉis sian vivon.

Idealisto estis Zamenhof kaj samtempe malpasia aganto, kiu neniam sekvis sian instinkton aŭ emociion, sed nur obeis al sia logika inteligenteco. Ni ĉiuj scias, ke malgraŭ la interna impeto doni al la homaro solvon de la lingva problemo, li atendis naŭ jarojn antaŭ ol publikigi sian verkon kaj ke en tiuj naŭ jaroj li paciencie elprovis plurajn formojn de Esperanto, korektadis kaj fundamente refaris ilin ĝis eltrovo de la definitiva. Tiu lia fera logika inteligenteco pli ol unu fojon savis Esperanton de la pereco, al kiu gvidus ĝin la fanatikuloj. La adorado, per kiu la unuaj esperantistoj ĉirkaŭis lin, neniam tuŝetis lian saĝecon. Li tuj komprenis, ke lingvo ne povas esti ligata al unu homo, sed nur al ĝiaj utiligantoj: tial, malgraŭ ĉiu malaprobo, tuj en la komenco li klopodis senpersonigi la Internacian Lingvon: li forĵetis por ĉiam ĉiajn rajtojn kaj rifuzadis esti leĝofaranto de la lingvo kaj gvidanto de la Movado. Kun karakteriza demokrata sento, li volis Lingvan Komitaton (nuntempe Akademio), kiu konstatu la naturan evoluon de la lingvo, kaj kies decidoj estu devigaj por ĉiuj. Konscia pri la neceso gardi la unuecon de la lingvo, li kreis la Fundamenton, sed samtempe, zorgema ne sufoki la maturiĝon de Esperanto, li akceptis kaj mem vaste praktikis la metodon de neologismoj, nome de paralelaj formoj flanke de la fundamentaj. Zamenhof frue komprenis, ke Esperanto estas akceptebla de la tuta homaro nur kiel lingvo kaj ne kiel nova speco de mistiko. Tial, li mem verkis la faman Deklaracion de 1905, kiun la unua Kongreso en Boulogne-sur-Mer alprenis kaj kiu restis kiel dua Fundamento, ne por la lingvo, sed por la Movado, ĝis hodiaŭ. Eĉ pli reliefigas lia racia konduto en la lukto kontraŭ la reformistoj. Zamenhof daŭre agnoskis, ke Esperanto ne estas perfekta, sed ke reformoj povus ĝin ruinigi: projektoj de reformoj dependas de la preferoj de unuopaj personoj kaj komencante la reformadon ni neniam povos kontentigi ĉies postulojn kaj devos senĉese aldoni reformojn al reformoj. Kiam eksplodis la Ido-krizo, en la tiama Movado ĉiuj perdis la sinkontrolon escepte de Zamenhof. Boirac volis forlasi la prezidantecon de la Lingva Komitato, Sébert esperis je abstraktaj kompromisoj, la esperantistoj ĉie akre kverelis unu kontraŭ la alia. Sed en Varsovio jam en la unuaj krizaj tagoj Zamenhof en plej granda trankvilo skribas kun preciza antaŭvido, ke Ido estas mortnaskito, kon-

traŭ kiu ne valoras lukti, ĉar "la ruza konstruaĵo baldaŭ falos". Li precize preparis la kontraŭagajn planojn kaj liaj antaŭvidoj tute plenumiĝis.

Graveco de organizo

Sed, ne ĉiam la bolantaj esperantistoj de la unuaj tempoj sekvis lin. Plurfoje kaj vane li proponas la fondon de neŭtrala komuna asocio tutmonda: unue en "La Esperantisto", jam en 1889, sub la nomo Tutmonda Ligo de Esperantistoj kaj poste en 1905. La reciproka malkonfido de la tiutempaj francaj gvidantoj kaŭzis, ke lia projekto eĉ ne estis diskutata en la Kongreso. Pasos tri jaroj ĝis kiam Hodler fondos U.E.A.; Zamenhof antaŭvidis kaj proponis tion 19 jarojn pli frue!

Estas signo de vera grandeco ne aparteni al unu epoko, sed al ĉiuj epokoj, resti aktuala trans la jardekoj kaj la jarcentoj. Ni lasu momenton Zamenhof kaj pririgardu la nuntempajn problemojn de la Internacia Lingvo de li kreita kaj klopodu apliki al ili iom da Zamenhofa disciplino.

La transiro de la nuntempa polilingvisma ĥaoso en la internaciaj rilatoj al monolingvismo — kio ja estas la alpreno de Esperanto — signifas formorton de jarcentaj rutinoj kaj privilegioj. En tiu senco Esperanto povas esti konsiderata lingvo-revolucio. Estas normale, ke kontraŭ ĝi koalicias ĉiuj malnovaj interesoj, kiuj akurate plektas ĉirkaŭ ĝi la komploton de silento. Ĉiuj revolucioj estas unue faritaj ne de la larĝaj amasoj, sed de elitoj gvidataj de intelektuloj. Esperanto ne estas kaj ne povas esti movado de amasoj. Ĝia socia portanto estas malplimulta avangardo. Tiu avangarda elito — la nuntempa esperantistaro — havas la funkcion maturigi la cirkonstancojn, en kiuj la Internacia Lingvo atingos la finan celon.

Fundamentan gravecon havas la demando ĉu la Esperanto-Movado efektive plenumas la supre skizitan rolon.

En la nuna stadio, kiam niaj tezoj ankoraŭ ne estas popularaj kaj ni ne disponas pri la rimedoj de amasinformado, la disvastigo de la Internacia Lingvo dependas grandparte de persona propagando. Kaj ĉar la publiko ne distingas — eble prave — la ideon de la homoj, la esperantistoj, volenevole, fariĝis prototipoj, laŭ kiuj estas juĝata la ideo de komuna lingvo. La tre delikata situacio donas al ĉiu el ni pezan respondecon. Ni povas adekvate plenumi ĝin, se ni enkondukos en nian Movadon tri internajn elitecojn: socia eliteco, kultura eliteco kaj eliteco de metodoj.

Kondiĉoj de progreso

Estis tempo, kiam la Movado konsistis grandparte el sciencistoj kaj plej gravaj Akademianoj. Estis la ora franca periodo. Kaj estis tempo, antaŭ kaj post la lasta milito, kiam esperantismo fariĝis sinonimo de malgranda sekto, kun adeptoj praktikantaj strangajn kultojn. Ni hodiaŭ ne volas esti Asocio nur por altaj tavoloj, nek disdonejo de etaj vivĝoj al vivmalfeliĉuloj. Movadano rajtas esti

ĉiu esperantisto, el kiu ajn socia ŝtupo, el kiu ajn raso, el kiu ajn religia, filozofia kaj politika konvinko. Sed, ni ne volas en niaj aktivaj vicoj homojn, kiuj en la ordinara vivo estas konsiderataj fuŝuloj, fantaziuloj kaj sentaŭguloj. Nur tiu, kiu en sia ĉiutago estas serioze respektata, povas sukcese disradii siajn ideojn kaj influi la ĉirkaŭan medion. Bona aŭ malbona socia konsisto de nia Movado estas ekzisto-demando por la Internacia Lingvo.

Kial la Esperanto-Movado bezonas altan kulturen nivelon? Ĉar esperantismo, kiel lingvo-movado, havas esence kulturen karakteron. Altigante la kulturen nivelon de la Movado, ni kreas la kondiĉojn, en kiuj ni regajnas al niaj celoj la simpatian de la intelektularo. Sen ili Esperanto ne havas esperon venki sian batalon. Tiu simpatio penetros ĉiujn tavolojn de la publika opinio, ĝis kiam la registaroj estos devigataj agnoski la Internacian Lingvon kiel fakton.

Kiam ni parolas pri Movado, ni ne celas senkorpan abstraktaĵon, sed konkretan unuiĝon de individuoj. Tial, kiam mi parolas pri kultura nivelo de la Movado, ni scias, ke ĝi estas proksimume suma rezulto de la kultura nivelo de ĉiu unuopa membro. Ĉiu el ni devas kontribui levi la kulturen nivelon de la Esperanto-Movado per senĉesa ampleksigo de nia propra klereco. Malofte devo estas pli agraba tasko ol en la nuna okazo. Nia spirito postulas ĉiutagan nutradon: la scio estas senlima, sed ĝiajn ĝuojn ne bremsas horizonto. Same kiel la Imperiestro Marko Aurelio je la fino de la tago ne estis kontenta, se li ne estis farinta bonan agon, tiel ĉiu movadano je la fino de la tago ne devus esti kontenta, se li ne plivastigis sian propran kulturen. Zamenhof mem, dronanto en peza kaj zorgoplena vivo, ne postlasis unu tagon ĝis sia morto sen labori intelektu. En la nokto, kiam Varsovio ripozis, Zamenhof kreis por ni senmortajn tradukojn, paroladojn, leteraron, li ellaboris la doktrinon de hilelismo kaj verkis — eble kiel la unua — plenan gramatikon de yiddish, hodiaŭ konservata en Muzeo en Jeruzalemo. Zamenhof mem konfesis, ke li konis 12 lingvojn: plurajn el ili li flegis ĝis la lastaj tagoj. Kie ni trovu pli taŭgan ekzemplon?

Eliteco de metodoj signifas unue klaran diferencon inter, unuflanke, la lasta celo kaj la afero mem kaj, aliflanke ties rimedoj kaj la simboloj. Nia strebado estas difinita en la Deklaracio de Boulogne-sur-Mer: "disvastigi en la tuta mondo la uzadon de lingvo neŭtrale homa, kiu ne enstrudante sin en la internan vivon de la popoloj kaj neniom celante elpuŝi la ekzistantajn lingvojn naciajn, donos al la homoj de malsamaj nacioj la eblon interkompreniĝadi inter si". La enkonduko de Esperanto en ĉiujn internaciajn rilatojn estas la fina celo. La Esperanto-organizaĵoj — lokaj, regionaj, landaj kaj internaciaj — estas nepre havindaj, sed nur provizoraj rimedoj. Ilia potencigo

estas necesa por la bono de la Internacia Lingvo. Sed, nia rigardo ne povas halti ĉe la limoj de niaj societoj : ni ne povas luli nin en blinda kontenteco de partaj atingoj. La taksado de nia laboro devas esti multe pli alta kaj objektiva : ni devas percepti la pulsadon de la Internacia Lingvo kaj la progresojn de ĝia popularigo ne interne de ni, sed tie ĉe la publika opinio. En Mainz Prof. Lapenna parolis pri la tempo, kiam la Esperanto-organizaĵoj ne plu estos necesaj. Niaj strebadoj per la Esperanto-organizaĵoj celas al tiu tempo.

Simboloj kaj esenco

Hodiaŭ oni plu ne diskutas pri la du famaj vojoj, kiuj konduku Esperanton al ĝenerala akcepto : nome pri leĝfarado de supre — flanke de oficialaj instancoj — kaj pri la iompostioma ĝeneraligo de malsupre, flanke de la popolo. Ni superis tiun demandon, ĉar hodiaŭ ni laboras samtempe laŭ ambaŭ principoj. Hodiaŭ ni konscias, ke ambaŭ vojoj estas nedisigeblaj, ke agnosko de supre kuraĝigas plian disvastigon de la lingvo malsupre, ke, inverse, pli vasta aplikado malsupre trenas oficialajn rekonon de supre. Sed, ankoraŭ en niaj tempoj, kelkaj adoras la simbolojn kaj kredas servi la aferon mem. Eksteraj simboloj — flagoj, insignoj, himnoj — estas nur pontoj por konvencie kaj sin-teze prezenti nian veron. Tiuj rekoniloj estas respektindaj kaj tradiciaj, sed ni devas preteriri la simbolon kaj posedi la esencon. Ne tiu, kiu — sincere aŭ demagogie — multe krias "samideano, samideano" vere faras por la Internacia Lingvo, sed tiu, kiu pozitive utiligas ĝin kaj kreas por ĝi.

Eliteco de metodoj signifas, krome, aplikadon de informadaj principoj, kiuj bone koheras kun la jarcento. Jam delonge pasis la tempo de romantikismo. Esti romantikaj en epoko de atomismo signifas esti dekadencaj. Homoj vivantaj en tempoj de rapideco kaj de mondproblemoj ne plu atentigas sentimentalajn argumentojn. Ili konvinkiĝas nur, se oni proponas avantaĝojn. Esperanto ne proponas al la mondo pliajn idealojn, sed simple solvon de la lingva ĥaoso, kun sekva nekalkulebla ekonomio de tempo, gajno de ekzakteco kaj defendo de la naciaj lingvoj kontraŭ lingvaj diskriminacioj.

Kiel jam konstatis UNESKO, Esperanto grave kontribuas al disvastigo de scienco kaj kulturo. Ĝi, do, ne plu estas projekto — kiel en la pioniraj tempoj de esperantismo — sed vivanta lingvo, kiu jam nun estas praktike uzata tra la tuta mondo por ĉiaj internaciaj interŝanĝoj. Ĝi, fine, alportas al la homaro fundamentan bazon, sur kiu eblas efektiviĝi solidarecon kaj moralan unuecon inter la popoloj. Elitaj metodoj signifas prezenti al la homoj la palpeblajn faktojn pri Esperanto, alvoki kaj konfidi al ties racio prefere ol al malfirmaj emocioj. En nia laboro por Esperanto ni ne rajtas forgesi, ke Esperanto estas lingvo kaj nenio alia ol lingvo. Ke ĝi evoluas laŭ la leĝoj de ĉiuj aliaj lingvoj, nome per alpreno de necesaj neologismoj kaj forlaso de nenecesaj arkaismoj.

"Esperantisto estas nomata ĉiu persono, kiu scias kaj uzas la lingvon Esperanto, tute egale por kiaj celoj li ĝin uzas. Apartenado al ia aktiva societo esperantista por ĉiu esperantisto estas rekomendinda, sed ne deviga". Per tiuj vortoj la citita Deklaracio de 1905, la fondoŝtono de nia Asocio, difinas nin. Ĉiu alia ideo, eĉ interna, kiun ĉiu el ni ligas al Esperanto estas pure privata afero, pri kiu Esperantismo ne respondecas. En la sama Deklaracio Zamenhof mem ĝisdetale fiksis, ke ankaŭ liaj opinioj kaj verkoj havas privatan karakteron kaj estas por neniuj devigaj.

Dum sia tuta vivo, Zamenhof mem, oferis siajn flankajn idealojn — kaj ni scias kiom fortaj kaj turmentaj ili estis — al la bono de Esperanto. Ne nur li verkis kaj akceptigis la Deklaracion, sed poste li plurfoje confirmis ĝin. Plej solene tio okazis dum la malferma parolado pri la fondiĝo de U.E.A. en Barcelono en 1908.

Ni hodiaŭ kunvenis por honori D-ron Zamenhof en la tago de la datreveno de lia naskiĝo. La plej taŭga honorigo, pli ol teksti laŭdojn al lia nomo, estas firma sekvado de lia ekzemplo, utiligado de lia verko kaj laborado por ĝi, ĝis atingo de la lasta celo.

Gian Carlo Fighiera

(*) Prelego farita en Varsovio okaze de la Zamenhof-festo. La redakcio opinias, ke la enhavo de tiu ĉi prelego estas tiel grava, ke ĝi meritas pli vastan diskonigon, precipe okaze de la Zamenhof-Jaro.

LA MAGNETOFONA SERVO DE UEA

46	Raportaĵo : La 42-a UK en Marseille, 1957	mez	1	90
47	Raportaĵo : La 10-a IEFF-Kongreso en Aarhus, 1958	mez	1	30
48	Raportaĵo : La 43-a UK en Mainz, 1958	mez	1	60
49	Raportaĵo : "Esperanto-instruado en Jugoslavio lernejo"	mez	1	15
50	Raportaĵo : "La unua esperantista laborbrigado"	mez	1	20
51	Raportaĵo : "Aŭskultu niajn gejunulojn !" (Esp. junulargvidantoj raportas)	mez	3	15
52	Ivo Rotkviĉ : "Mortotago de Zamenhof"	mez	1	20
53	Ivo Rotkviĉ : "Esperantista Geografio"	mez	1	15
54	Joso Ŝlat : "Bosnio kaj Hercegovino" (La			

	popola respubliko)	mez	1	15
55	Joso Ŝlat : "La respubliko Slovenio"	mez	1	15
56	Joso Ŝlat : "La popola respubliko Makedonujo"	mez	1	15
57	Mirko Mamoŝiĉ : "Vojvodino" (La nordorienta parto de Jugoslavio)	mez	1	15
58	Branislav Nuŝiĉ : "La unua amo" (Humoraĵo)	mez	1	15
59	Petar Ĝunio : "La malbone edukita papago" (Humoraĵo)	mez	1	20
60	Petar Ĝunio : "La fantomo" (Humoraĵo)	mez	1	15
61	Paden Juraj : "Diabloj plugis la kampon" (Radio-dramo)	mez	3	15

Malgranda vilaĝo kiel ekzemplo

S-ro Ramon Molera, ĉefdelegito de U.E.A. por Hispanujo, sendis al la IOK leteron, en kiu, interalie, estas dirite: "Certe, ankaŭ en loka medio oni povas labori kaj kontribui al la laboro rekomendita de la IOK". Al la letero estas aldonita programo pri la aranĝoj okaze de la ZAMENHOF-JARO en la vilaĝo Moyá, proksime de Barcelono. Ĝi tekstas:

"Nia vilaĝo estas malgranda, ĝi havas 2.500 loĝantojn, sed nia Grupo estas vigla: 45 gejunuloj apartenas al ĝi. La Estraro bone studis la indikojn de la Internacia Organiza Komitato de la Zamenhof-Jaro, kaj ni planis jenajn aranĝojn:

1. Inaŭguro de Zamenhof-strato. Ni jam atingis la koncernan permeson de la lokaj Aŭtoritatoj, kaj la nova strato, kiu havos la nomon "Dr. Zamenhof — Aŭtoro de Esperanto", estas situata en la centra parto de la vilaĝo.

2. Je la komenco de majo kiel kursofinan feston de niaj du nunaj kursoj — partoprenas ilin 25 gejunuloj — ni okazigos letervesperon.

3. En nia loka monatgazeto "La Tosca" ni publikigos gravan raporton pri la korespondaj kursoj de H.E.F., kiuj funkcias ĉe ni (eksterordinara numero de aŭgusto); en la decembra numero aperos artikolo pri D-ro Zamenhof; okaze de la inaŭguro de la strato ni ankaŭ aperigos interesan kronikon.

4. Venontan aŭtunon, ĉe la Biblioteko de la Loka Ŝpara Kaso, ni faros prelegon kun la helpo de gramofondiskoj (diverslandaj popolaj kantoj) kolektitaj pere de Esperanto.

5. Okaze de la Zamenhof-Tago nia Grupo havos specialan kaj solenan kunvenon".

La Esperanto-Grupo de Moyá antaŭvidas ankaŭ plurajn aliajn internajn aktivecojn. La letero finiĝas per la vortoj: "Pere de la antaŭdiritaj okazontaĵoj ni deziras iom kunlabori al la solena 100-jara datreveno de la naskiĝo de la aŭtoro de Esperanto".

La Esperanto-Grupo en Moyá meritas gratulojn. La Esperanto-Grupoj en malgrandaj lokoj devus imiti ĝian ekzemplan. Kaj la grandaj malnovaj Esperanto-societoj, el kiuj pluraj festas nuntempe la 50-jaran jubileon de ekzistado, devus konsiderinde transpasi la aranĝojn, kiujn efektivas Esperanto-Grupo en malgranda hispana vilaĝo.

Pliaj artikoloj en la nacilingva gazetaro

Alvenis pliaj eltranĉaĵoj kun artikoloj pri la Zamenhof-Jaro el diversaj landoj. La Zamenhof-festo de la Svisa Esperanto-Societo Biel-Bienne estas raportita en dukolumna informo, verkita de Richard Walter, neesperantisto, profesoro de lingvoj, en la gazeto **Journal du Jura**. Laŭ la raporto, la festo brile sukcesis. Parolis s-roj M. B. Graf, Prof. D-ro E. Privat kaj Albert Lienhard el Mulhouse. F-ino Nadja Samojloff, pianistino, ludis tri pecojn de Brahms, Chopin kaj Liszt. La aranĝo okazis en la urbodomo.

En la bulgara gazeto por instruistoj **Uĉitelsko Delo** aperis dukolumna artikolo sub la titolo "La Instruistoj kaj Unu Centjaro".

Ankaŭ la Esperanto-gazetoj komencis publikigi artikolojn pri la Zamenhof-Jaro.

La landaj asocioj, landaj informaj fakoj kaj kunlaborantoj en regionoj sen organizita Movado estas ankoraŭfoje petataj sendi al la adreso: **44-a Universala Kongreso de Esperanto, Varsovio, Pollando** aŭ al CED aŭ al la Centra Oficejo de U.E.A. artikolojn, informojn aŭ alian materialon, kiuj aperis en gazetoj kaj revuoj kun jenaj indikoj, skribitaj per presliteroj: 1. Nomo de la gazeto aŭ revuo, dato, numero, loko de apero kaj lando; 2. Esperantlingva traduko de la titolo; 3. Indiko de la lingvo.

Malgrandaj Informoj

Laŭ Radio-Zagreb, elsendo de la 26-a de marto, **Jugoslavia Esperanto-Federacio** planas eldonon de tuta aro da libroj okaze de la Zamenhof-Jaro. Tio ĉi estas la plej granda aktiveco sur la eldona kampo en la tuta historio de la Jugoslavia Esperanto-Movado.

En **Indonezio**, okaze de la 100-jara datreveno de la naskiĝo de Zamenhof, en Bandung estos la Unua Kongreso, ligita al pluraj kulturaj aranĝoj, de Indonezia Esperanto-Asocio. Estas sendita presita invito al multaj esperantistoj tra la mondo partopreni la Kongreson. Ĉiuj partoprenantoj eksterlandaj estos gastoj de la organizantoj.

Kalendaro por la jaro 1959 kun kolorportreto de D-ro L. L. Zamenhof kaj subskribo "Centjara Jubileo de D-ro L. L. Zamenhof 1859—1959" estas eldonita de "El Popola Ĉinio", Peking.

BAZA DOKUMENTO EN LA NEDERLANDA LINGVO

La nederlanda asocio L.E.E.N. ĵus eldonis la Bazan Dokumenton pri la Zamenhof-Jaro en la nederlanda lingvo en 5000 ekzempleroj. La broŝuro havas la saman formaton kaj aspekton kiel la angla, franca kaj speciala esperanta eldonoj. La nederlanda broŝuro jam estas distribuata. I.a. ĝin ricevis diversaj organizaĵoj, redakcioj

de gazetoj, elstaraj publikaj agantoj, ĉio ĉi okaze de la publika kunveno, okazinta en Rotterdam la 6-an de aprilo, kiam Prof. G. Canuto kaj Prof. I. Lapenna parolis pri la lingva problemo en la scienco kaj en la nuntempaj internaciaj rilatoj.

LA VOĈO DE ZAMENHOF

Plurfoje, en 1902/1904, esperantistoj uzis fonografon por aŭdi la voĉon de siaj oratoroj, kaj precipe la voĉon mem de D-ro Zamenhof.

Kaj en 1909, okaze de la brilsukcesa 5-a Universala Kongreso en Barcelona, Alfons Sabadell gravurigas la voĉon de D-ro Zamenhof kaj la voĉon de aliaj konataj esperantistoj sur vaksajn fonografcilindrojn.

Sed la plej perfekta voĉregistrado okazis la 28-an de Aŭg. 1911 en Paris.

Efektive, tuj post la grava 7-a Universala Kongreso en Antwerpen, Zamenhof, kvankam tre laca, veturis speciale al Paris por tiu celo. Inter tiuj du urboj, li vojaĝis en la sama kupeo kun du francaj esperantistoj, kiuj, feliĉe, ankoraŭ vivas: S-ro Charles Pichon, katolika ĵurnalisto, nun en Roma, kaj S-ro Emile Tison, polic-inspektoro, nun en Sarcelles, apud Paris.

Jen kiamaniere Félicien de Ménénil, la muzikiginto de nia himno, raportis en "Paris-Esperanto", numero de Nov. 1911, pri tiu vizito (el la franca lingvo, mi libere tradukas la ĉefajn frazojn):

"Matene, D-ro Zamenhof vizitis la Redaktejon de "Le Petit Parisien".

Dum la tagmanĝo en "Aéro-Club", antaŭ la mirinda panoramo de la "Place de la Concorde" lumigita de brilega suno, S-ro L. Gaumont, inventinto de la parolfilmoj, petas de D-ro Zamenhof, ke li venu pozi antaŭ liaj aparatoj, por ke oni fiksu neforviŝebla la fizionomion de la aŭtoro de Esperanto, liajn gestojn, kaj liajn parolojn.

En la aŭtomobilo de S-ro Gaumont, ni rapide atingas en la kvartalo Belleville fabrikon, kiu konsistigas veran laboristan urbeton kun siaj sep cent laboristoj, siaj stratoj kaj siaj specialaj scenejoj. Tie oni provludas kaj faras la famajn filmojn por la tuta mondo.

En la malgranda teknikejo, kie funkcias la registraj aparatoj, mi ĝoje ĉeestas spektaklon, kies impresoj longatempe restados en mia memoro.

Sub la radioj verŝataj de la blindigaj reflektiiloj, D-ro Zamenhof staras, nigrafrake vestita, kun simpla verda stelo ĉe la butontruo; modeste sintenanta, sed kun ardaj okuloj malantaŭ oraj okulvitroj, li eldiras la "Preĝo sub la verda Standardo".

Lia voĉo laŭtiĝas firme, tamen ĝi havas tre dolĉajn tonojn. Momente la frazinoj iom malsonoriĝas, sed restas klaraj, kaj la harmonia poezio malvolvas siajn flamajn strofojn, kies balanciĝoj kvaŝaŭ gracie flugas.

La spektaklo naskas emociion veran: la lastaj vortoj vibriĝas per profetaj akcentoj, kaj sub la fajroj, kiuj fluas el ĉiuj flankoj, falas el la suno

trans la varmega vitra plafono kaj torentas el la potencaj elektraj lampegaj, ŝajnas, ke la vizaĝo de D-ro Zamenhof transfiguriĝas.

Kelkaj ĉeestantaj esperantistoj propramove aplaŭdas; ankaŭ la laboristoj: kvankam nekompreneblaj, ili tuj sentas la noblecon de la gesto kaj la dolĉecon de la lingvo".

Tiu registrado okazis en parto de la "rue des Alouettes (1)", kies nomo estas nun "rue Carducci", no. 12, Paris-XIX.

Unu jaron poste, en ankoraŭ ne publikigita letero de la 24-a de Nov. 1912, G-lo Sébert skribis al Zamenhof: "Mi esperas, ke vi ricevis la aparaton "Kinora" kun kinematografia filmo, kiun mia amiko Gaumont preparigis kaj oferdonis al vi".

Ĉu Zamenhof ricevis tiun leteron aŭ ne? Kio ajn estis, li respondis nee iom poste.

Nu, gramofonaĵo sendita al London, en 1904, malaperis....

La registraĵo de Gaumont ankaŭ malaperis.... en Paris (tre verŝajne, ĝi estis laŭkontrakte kaj intence detruita — kun aliaj registraĵoj —, kiam Gaumont vendis sian firmon. Nur du francaj paroladoj estas konservataj en Muzeo "Artoj kaj Metioj" de Paris). Sed ĉu restas providence ekzemplero en Warszawa? Tion mi esperas (leginte en la "Projekto de Filmo pri Zamenhof kaj lia Verko" ("Esperanto" sept. 1958):.... "Zamenhof sur la ekrano (filmo de Pathé farita en Parizo, 1910)", kvankam Pathé ne estis Gaumont kaj 1910 estis antaŭ ol 1911.... Mi ja esperas.

Sabadell, en Barcelona, estis la sola persono, kiu posedis la voĉon de Zamenhof en cilindro. Kompreneble, multfoje oni disaŭdigis tiun cilindron, kio kaŭzis sur ĝi difektojn pro la skrapado sur la vakso. Por ke ĝi ne plu difektiĝu, D-ro Jacint Bremon, kuracisto en Barcelona, reproduktigis en 1930 tiun registraĵon sur plata gramofondisko. Fine, en 1957, S-ro Santacana registris sur magnetofona sonbendo tiun diskon, kies specimenon pie konservis kiel relikvon S-ro Jacint Comella, delegito de U.E.A. en Vich.

Dank'al la granda komplezo kaj aranĝemo de S-ro Comella, la Grupo de Paris havigis al si unu sonbendon (2) kaj prezentis ĝin dum solena vespero en "Sorbonne". Tiu sonbendo aŭdigas, post enkonduka paroladeto de D-ro Bremon, la voĉon de D-ro Zamenhof deklamantan "La Espero" kaj poste salutantan per kelkaj vortoj la esperantistojn, kiuj tiam ĉirkaŭis lin en la hejmo de Sabadell.

(1) = strato de la Alaŭdoj.

(2) Alia simila sonbendo estis sendita al Aŭstralio, kie oni aŭdigis ĝin dum januaro 1958 okaze de Esperanto-Kongreso en Melbourne.

Postkongresa Urbo - Krakovo

Al la plej allogaj urboj de Pollando, al la plej interesaj kaj malnovaj apartenas la iama reĝa urbo Kraków (Krakovo). Laŭ la legendo fondis ĝin Krak, la fama mita heroo princo, venkinto de monstra drako. Ĉi-jare Krakovo festas sian 1.000-jaran ekziston.

La urbo, konstruita en daŭro de dekelko da jarcentoj, etendas sin plejparte sur la maldekstra bordo de Vistulo. Ĝia pitoreska situo, multaj grandiozaj vidindaĵoj kaj historiaj memoraĵoj kaŭzas, ke Krakovo estas volonte vizitata de fremdaj turistoj.

Ĉi-jare Krakovo estos la urbo de la Postkongreso. Bonvenon.

Ekskursoj

Wieliczka (Vielička), plej malnova (9-a jc.) kaj plej granda en Eŭropo salminejo, 7 etaĝoj sub la tersurfaco, 150 km da koridoroj, kapeloj kaj subtera lago, postlasas neforviŝeblajn impresojn.

Zakopane. Aŭtobuso aŭ fervojo veturigas nin inter pentrindaj ĉirkaŭaĵoj al Zakopane, centro de Tatroj, ĉefa stacio de turismo kaj de ĉiuj sportoj. Poste per aŭtobusoj al Morskie Oko (Mara Okulo), kiu situas inter nealireblaj rokoj 1.400 m alte. Zakopane estas centro de montekskursoj kaj de somera kaj vintra ripoz-libertempoj.

Częstochowa (legu: Ĉenstoĥova). Survoje de Varsovio al Silesio kuŝas la fama vastkonata urbo Ĉenstoĥova fondita en la 14-a jarcento, kiam Vladislao Jagiello fondis ĉi tie preĝejon kaj monaĥejon de Paŭlinoj, starantan sur Jasna Góra (Hela Monto). La monaĥejo estis antaŭe bonega fortikaĵo, kiu kontraŭstaris invadon de svedoj en la j. 1655. En la sama jarcento ĝi estis bazo de Bara Konfederacio (kiu celis batale konservigi liberecon al Pollando), de kie estro Puławski batalis poste por libereco de Usono.

La monaĥejo de Jasna Góra estas la pia pilgrimada urbo, al kiu rapidas ĉiujare miloj da krista-

noj el la tuta lando por ricevi indulgencon (la 8-an de julio kaj la 15-an de aŭgusto).

En la kapelo troviĝas bildo de la S-ta Di-patrino, la mirakla bildo prezentanta Nigran Madonon kun malgranda Jezuo. La preĝejo havas kelkajn salonojn, el kiuj la plej vidinda estas la Kavalira Salono ornamita per bildoj prezentantaj kontraŭsvedan batalon en la 17-a jc. La monaĥejo posedas riĉenhavan bibliotekon kaj trezorejon. En la preĝejo supreniĝas 100 m alta turo, de kiu estas videbla pentrinda pejzaĝo.

Nunjare Ĉenstoĥova iĝis la postkongresa urbo de IKU (Internacia Katolika Unuiĝo) kaj la kunveno de katolikaj esperantistoj el la tuta mondo.

Pieniny. Ĉ. 100 km de Krakovo troviĝas unu el la plej unikaj kaj belegaj vidindaĵoj de Pollando, la ĉirkaŭaĵo de montaro Pieniny. La belegaj trarompoj de rivero Dunajec kaj la abruptaj krudaĵoj de montaltaĵaj pintoj formas nepriskribeblan kaj tre interesan fenomenon de la pola pejzaĝo. La belegaj kaj treege pentrindaj ĉenmontaroj, kelkaj rokoj kaj admirinda arbaro prezentas al ni unikan kaj belegan turisman regionon, kiu apartenas al la plej ĉarmaj kaj interesaj vidindaĵoj en la tuta Eŭropo.

La belegajn kurbiĝojn de rivero en la profundaj rokoj kaj la sovaĝan floraron admiras ĉiuj. Ĉiu, do, turisto vizitanta ĉi regionon devas flostransportiĝi sur la indiĝena, montana boato laŭ la rivero Dunajec.

La romantikaj ruinoj de kasteloj Ĉorŝtin kaj Nidzica same kiel ankaŭ la rokoj de Pieniny kaj iliaj trarompoj postrestadas neforgeseblajn rememorojn por la tuta vivo.

Emil Mayer, Kraków.

Bonvolu se eble tuj aliĝi al la Postkongreso al la sekretario

Krak. Kulturdomo-Kraków, Rynek G. 27

(daŭrigo p. 87)

Malgraŭ neeviteblaj kaj nekorekteblaj gravaj difektoj (oni pripensu, ke la magnetofono reproduktis diskon, kiu mem reproduktis malmmodernan cilindron!), tiu sonbendo forte impresis: la emocio de ĉiuj aŭskultantoj estis granda, ĉar ni ja sciis, ke ĝi eĥas la *veran* voĉon de D-ro Zamenhof. Nekomparinda historia atesto!

— Antaŭe mi imagis D-ron Zamenhof kiel iom moralpredikeman. Mi devas konfesi, ke de post la aŭskultado de la sonbendo, mi vidas lin kiel homon decideman, kun vigla kaj klara menso, kun dolĉa sed konstanta volo, ne jam atingintan sian celon.

Roland Jossinet



LA JUNA VIVO

Cion por la redakcio de "L. J. V." sendu al :

Philippe Bonnard,

119 Avenue de Choisy, Paris 13, Francujo

Kun nova forto antaŭen !

Tio des pli validas por la nova jaro, ĉar ĝi estas la Zamenhof-Jaro. En la tuta mondo prepariĝas grandaj manifestacioj por solene festi la centjaran datrevenon de la naskiĝo de D-ro Zamenhof. Ankaŭ la junularo devus grandskale partopreni en la organizado de tiuj festoj en la tuta mondo ne forgesante, ke posta eluzo de foje akiritaj tereno estas same grava kiel bona preparo de iu aranĝo. Nia junulara movado pli kaj pli fortiĝas. Ankaŭ en la lasta jaro aldoniĝis pliaj landaj sekcioj de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo kaj la jam ekzistantaj faris konsiderindajn progresojn. Sed nia rigardo iru al la nova jaro ! Ni ne povas esti kontentaj pri tio, kion ni atingis ĝis nun. Ĉiu sukceso estu nur nova instigo por ankoraŭ pli konscia laboro laŭ certa plano. Ju pli oni laboras en la Esperanto-movado, des pli oni rimarkas, ke nur bone preparitaj agadoj povas konduki al sukceso.

Tial ni streĉu havi plej bonan organizon, ĉu en la landaj sekcioj aŭ en la lokaj grupoj. Multaj gejunuloj estu pretaj por helpi en la laboro, eĉ se kelkaj nur povas tre modeste kontribui.

La interna grupa laboro havu kiel eble plej altan nivelon, tiel ke ankaŭ la ekstera mondo havu klaran ideon pri tio, ke ni ne estas stranguloj, sed homoj laborantaj por alta idealo nepre efektivebla. El tio kresku la kunlaboro kun ne-esperantistaj junularaj organizaĵoj, precipe kun tiaj, kiuj mem jam ofte spertis la malfacilaĵojn de la internacia interkompreniĝo. Al ili ni montru ankaŭ per nia internacia laboro, ke la Esperanto-movado ne konas limojn kaj havas ĉiujn kontaktojn en la tuta mondo. Kiel eble plej multaj gejunuloj vizitu en ĉi tiu jaro la 15-an Internacian Junularan Kunvenon de TEJO en Dancigo kaj la 44-an Universalan Kongreson de Esperanto en Varsovio. La Jubilea Zamenhofa Jaro ankaŭ tiurilate montru nian forton. Ni prenu novajn personajn kontaktojn per eluzo de la korespondaj servoj. La lokaj grupoj ĝemeliĝu kun alilandaj junulargrupoj. Speciale dezirinde estas, ke la reto de la junularaj delegitoj fariĝu kiel eble plej densa, ke ankaŭ la junulara sekcio de UEA havu siajn reprezentantojn en la tuta mondo.

Paŝo post paŝo ni laboru en la nova jaro por la plej granda bono de la homaro.

Ĝis revido en Dancigo kaj Varsovio !

Günther Becker

Prezidanto de Tutmonda Esperantista Junulara Organizo.

POLA ESPERANTO-JUNULARO

Post longa tempo de klopodoj de diversaj aktivuloj estis kreita pola junulara esperantista organizaĵo **Pola Esperanto-Junularo** — kiel sekcio de Asocio de Esperantistoj en Pollando. La kreo de la organizaĵo estis decidita dum Junular-Kunveno de XV-a Tutpollando Esperanto-Kongreso en Krakovo (21.9.1958).

PE-J havas sian propran regularon. Tutpollanda estraro de PE-J havas sian ejon en Gdańsk kaj konsistas el jenaj personoj :

prezidanto — Marek Pietrzak

vicprezidanto — Stanisław Michalski

sekretario — Henryk Kosicki

kasistino — Teresa Zienkiewicz kaj pliaj membroj : Sabina Rode, Romuald Skaliński, Kazimierz Gęborski, Eugeniusz Papciak, Lucjan Krawczyk.

PE-J havas membrojn :

1. ordinaraĵojn — kiuj estas ĉiuj membroj de AEP ĝis 25 jaroj.

2. kolektivajn — kiuj estas diversaj Esperanto-Rondoj, Sekcioj aŭ Kluboj ĉe lernejoj, junularaj neesperantistaj organizaĵoj, universitatoj, fabrikoj k.s.

3. honorajn.

Estraro de PE-J klopodas eldonadi propran multobligitan gazeton sub titolo TAMEN.

PE-J estas membro de TEJO.

Adreso : Pola Esperanto-Junularo str. Garncarska 18, Gdańsk - Pollando.

EKSPERIMENTO PRI KOMBINO DE VOJAĜOJ

Dum la 14-a IJK en Homburg akceptiĝis propono kiu celas pligrandigi la profiton kiun la junularo akiras per la lernado de Esperanto. La plej gravaj utiligoj de la Internacia Lingvo — la vojaĝoj kaj la kongresoj — ofte postulas tro multe da mono. La ĉi-suba projekto celas plimalkarigon de vojaĝoj por gejunuloj.

Tio i.a. estas eble jene :

1. Uzado de plej malmultekostaj vojaĝiloj kaj restadejoj;

2. Ariĝo en kiel eble plej multnombraj grupoj, pro la rabato;

3. Akiro de subvencioj.

Ĉe 1. : Vojaĝ-eblecoj, ekz. per ŝarĝaŭtomobilo aŭ ŝipo sen ŝarĝo por parto de la vojo, aŭ per biciklo, tre dependas de lokaj kaj tempaj cirkonstancoj, malsituacio kaj deziro al komforto de la grupo, k.t.p. La in-

struisto aŭ organizanto do mem serĉu kaj informiĝu ĉe transportaj entreprenoj.

Tranokto estas ebla en tendoj, ĉe samideanoj, en junulargastejoj, en iu halo aŭ barako. Se vi trovas originalajn vojaĝilojn kaj tranoktejojn, kaj kuraĝas peti permeson de la aŭtoritatoj, tiuj kelkfoje surprize bonvole helpas vin. Ĉi tiu parto de la organizo apartenas al la tasko de la gvidonto.

Ĉe 2. : La ariĝo en grupoj havas tri avantaĝojn :

a. ofte gravaj rabatoj;

b. la lernintoj el diversaj landoj ekzercas la lingvon, kaj la vojaĝaj, komunaj aventuroj spontane kaj efike kunigas kaj ĝojigas la gepartoprenantojn;

c. vizitante iom regule junulargastejojn, ekskursadojn, muzeojn, k.t.p. ni fariĝos klientoj. La butikistoj nun gajnas monon de ni. Sekve ni ne plu bezonas peti al ili la aplikon de Esperanto sed povas ĝin, ĝentile, postuli.

Por kunigi tiujn grupojn estas necese ke la lokaj gvidontoj sendu siajn vojaĝprojektojn al iu centro : "la vojaĝoficejo de TEJO". Tiu centra persono prenos mapon de Eŭropo kaj provos kombini la vojojn kaj datojn de la diversaj ensenditaj projektoj. La centrigo kaj kombino do celas eviti ke, ekzemple, al Varsovio forveturos nederlanda duonplena aŭtobuso, dum ke tri tagojn poste 19 belgoj, sen rabato, forvojaĝos per trajno en la sama direkto. Kompreneble ankaŭ izolaj vojaĝantoj povas ensendi sian ferian programon.

Kiam la centro fiksis, kun ĉies konsento, la programon, ĝi povas peti al lokaj TEJO-anoj en la urboj de restado, ke ili ankoraŭfoje detale kaj atente serĉu kaj demandu pri malkaraj restejoj, ekskursoj, akceptoj en lokaj Esperantogrupoj, manĝejoj, k.t.p., nun armitaj per ekzaktaj nombroj kaj datoj. Speciale oni nun ankaŭ avertu la pagotajn vizitejojn, ke oni zorgu pri ia Esperanto-akcepto. (Vd 2c.)

Ĉe 3. : Se la grupo kapablas prezenti folklorajn teatraĵojn, muzikon, pantomimon, aŭ ion tian, kelkfoje estas eble peti subvencion de UNESKO en la kadro de "internacia kultura interŝanĝo". La kondiĉoj diferencas laŭloke. Vi do mem informiĝu.

Ankaŭ oni povas gajni monon per tiaj prezentadoj, ĉu per enirprezoj, ĉu per sindisponigo al reklamo por iu firmao.

Propono.


En Homburg oni decidis fari modestan eksperimenton por akiri iom da sperto. Laŭ la rezultoj oni definitive decidis dum la 15-a IJK. Tiuj rezultoj — kaj ni treege emfazas tion — tute dependos de la kunlaboremo de la gvidontoj kaj enlokalaj akceptontoj.

Hans Bakker, filo,
De Colignystraat 91,
Delft, Nederlando.

„Leona de Fortepiano”

”Muziko estas eksterordinara donaco
de la vivo, kaj ĝia lingvo komprenebla
por ĉiuj”.

Artur Rubinstein



(1) Antaŭ ĉio provo
de la fortepiano;
la instrumento
estas bona.



(2) Ankoraŭ unu
aŭ du ”pecoj”, kaj
jam renkonto kun
studentoj de
muziklernejoj.

Ne estas vero, ke Arturon Rubinstein nomis "Leono de fortepiano" la subskribinto. Sed vero estas, ke multaj recenzistoj konsideras tiun grandan Polon *) kiel la plej grandan nuntempan pianiston, nekompareblan kun iu ajn. Vere — li estas muzikisto de neofte renkontata rango kaj inter la plej altrangaj individuecoj (kiel Małcużynski, Richter, Kiyoko-Tanaki, van Cliburn k.s.) kaj li estas la plej ĉiuflanka. El lia interpreto Chopin ne estas sindetena, kiel ekz. ĉe Małcużynski, nek milda kaj sentimentala kiel ĉe Richter. Rubinstein kunligas en sia muziko realecon kun temperamento, objektivecon kun persona artismo.

Ludante, Rubinstein estas antaŭ ĉio arkitekto de sia instrumento. Ĉiu komponaĵo — estu ĝi Sonata Appassionata de Beethoven ĉu Balado G-minora de Chopin aŭ lia Scherzo, aŭ miniaturo de Debussy ĉu de Albeniz — ĉio ĉi ekfloras ĉe Rubinstein kiel impona pejzaĝo arkitektura, koordinita en siaj proporcioj kaj skizoj de la formo. Tiu pianisto estas majstro de koloro: Beethoven sonas ĉe li kiel orkestro de lia simfonio, kaj Debussy li instrumentigas en la stilo de tiu granda majstro. La afero konsistas en tio, ke ĉiu el tiuj sopir-bremsantaj detaloj estas en servo de granda arkitekturo de la komponaĵo. Dank' al tio la atento de aŭskultanto estas dum la tuta tempo koncentrigita, gvidata de la saĝa mano de Rubinstein; la ludo estas tuttempe tre interesa, pasiiga.

Rubinstein — laŭ ekzemplo de grandaj scenartistoj — malkaŝas ĉiujn siajn eblecojn. Li alkondukas nin al kulmina punkto celkonscie, konsekvence, nenie permesante al si sentimentalismon. Oni sentas en lia ludo disciplinon, ne disciplinon altruditan, sed iele organike elfluantan de la granda sperto kaj artisma matureco.

La ciklo de komponaĵoj, prezentita en la monato majo de Rubinstein en Varsovio komence de etudoj ĝis Koncerto E-minora prezentiĝas kvazaŭ enciklopedia revuo de l'arto de la muzika genio Chopin, ekspozicio de liaj sekretoj, principoj kaj riĉeco. A. Rubinstein estas kvazaŭ sintezo de rilato de nia tuta nuntempa epoko al la muziko de la granda Chopin.

La varsoviaj koncertoj de Artur Rubinstein forpasis, sed ŝajnas al ni, ke daŭre iliaj tonoj sonas en niaj oreloj. La neforgesebla virtuozo, forlasante la gastemajn sojlojn de sia Patrujo, promesis reveni denove en la jaro 1959 kaj denove regali nin per sia ĉarmoplena ludo, kiun ni en tia interpretado ne havas ofte feliĉon aŭdi. Ho — ke la vizito de Rubinstein estu jam.... morgaŭ.


Foto : CAF - Barorcz

Walerian Włodarczyk

*) Artur Rubinstein, loĝanta konstante ekster la limoj de Pollando, tamen estas — malgraŭ



(3) *Koncerto finita. Bravo-krioj ne volas finiĝi; li bisis jam kelkfoje.*



(4) *Momento de ripozo post la tago, kiu estus eĉ tiam tro mallonga, se ĝi daŭrus pli ol 24 horojn.*

Belartaj Konkursaj 1958

Branĉo: Originala Prozo

OPIO

3-a premio

"Kiom vi vetus, ke mi malpravas?" kriis Sando Makferso. Lia krio aŭdiĝis eĉ super la tintado de glasoj kaj laŭta babilado en la biertrinkejo. Ĉiuj ekatentis. Sando daŭrigis. "Jen mia salajrokoverta, tuta, krom la prezo de du glasoj da biero; mi vetas ĝin kontraŭ la via, ke la Edovaj Trafantoj gajnis la Skotan Futbal-Pokalon en la jaro 1932 kaj plue, ke mi povas nomi la ludintojn de ambaŭ flankoj". "Neeble", rediris la kontraŭulo, "Vi nur blagas!" "Vi do konsentas la veton?" Amiko de la kontraŭulo ektiris lian manikon. "Ne vetu kun Sando Makferso pri futbalo; estas tro riske; mi jam spertis".

Sando ridetis fiere, konscia pri sia prestiĝo. "Do", cedis la kontraŭulo, "Mi ne vetos, sed mi ne scias kiel iu ajn povas teni tiom da detaloj en la kapo". Vere, Sando havis mirindan memoron... pri ĉio rilate futbalon. La subadministranto ĉe la fabrikejo rikanu kiom ajn pri la ŝtipkapeco kaj forgesemo de li ĉe la laboro (unu tagon, Sando, servante kiel hisisto lasis fali ĝis la fundo plene ŝargitan ujon, pro nura distreco) li estis reĝo kiam temas pri futbalo kaj la kariero de la loka teamo, Edovaj Trafantoj. Li estis fondmembro de la Edov-Trafantoj-Subtenanta Societo kaj agis dum pluraj jaroj kiel sekretario, mendante omnibusojn por porti la fidelulojn al la aliurbaj ludoj de sia teamo kaj trudvendante ĝis ĝeneco enir- kaj veturbiletojn inter la laborejaj kunuloj, amikoj kaj parencoj. Li eĉ "martiriĝis" por sia amata teamo. Tio okazis en la jaroj de la granda industriostagno. Firmaoj luktis kontraŭ hejm- kaj eksterlanda konkurenco por mendoj; multego da laboristoj restadis senokupaj kaj eĉ la futbalkompanioj suferis grandajn monperdojn. Okazis laŭkutime, la pokalludoj inter la kvindekelkaj teamoj kaj la tute ne malofta fenomeno de du sinsekvaj egalig-ludoj inter la du lastaj luktantoj por la tiujara pokalo. Nu, unu el tiuj du teamoj estis la Edovaj Trafantoj kiu tiel, post serio de nesukcesaj jaroj batalis ĝis la supro de la futbalmondo. La tria, decida ludo devos okazi sur neŭtrala tereno, nome en urbo tridek mejlojn for. Ĉesto postulis posttagmezan libertempon de la laboro, ĉar la ludo devis okazi merkrede. Tiam venis terura frapo: ĉiu el la kvar grandaj fabrikejoj en la urbo anoncis, "Neniu forpermeso por futbalo merkrede; forrestantoj nepre maldungiĝos". La mastroj rifuzis intertrakti kun delegitaro de la futbalkompanio kaj la "Subtenantoj". Ilia verdikto restis neŝanĝita pro iu preteksto, ke ili havas gravajn kontraktojn plenumendajn antaŭ limdato.

"La furzuloj!" furiozis Sando Makferso, "Ĉu ili pensas sin sklavestroj? Ni amase eliru, ili ne povos maldungi nin ĉiujn!"

"Ili povus perdi pluajn mendojn kaj tiam eĉ pli el ni estus senlaboraj", timis kelkaj. "Piedtretindaj vermoj!" mokis Sando sed vane li provis disvendi biletojn: nur manpleno da fideluloj akompanis lin por spite iri al la ludo.

La minaco montriĝis sincera. La forrestantoj estis senlaboraj de tiu tago kaj dum sep kruelaj jaroj Sando putriĝis en labormerkato kiu havadis superfluan da laboristoj. Dum tiu tempo nur la bonvolemo de la futbalkompanio ebligis al li jen kaj jen senpagan viziton al iu ludo. Feliĉe tiu tempo forpasis. La antaŭmuĝo de preparata milito ekvigligis la radojn de industrio kaj Sando kun multaj miloj de samsortanoj denove regule laboris.

Intertempe li krome havis malĝojon pri sia filo. Li instruis lin infana miraklo kapabla nomi ĉiun teamon en Skotlando kaj la ĝustan nomon de iliaj ludkampoj kun multaj aliaj faktoj pri la nacia sporto. Lia elekto al la lerneja futbalteamo donis esperon al la patro, ke li vidos sian filon atingi la gloran lokon de profesiulo en la sporto. Ve! Lia filo alie evoluigis; perdis intereson kaj sin okupis pri librecaj aferoj; ekvolis fariĝi kuracisto. En tio lia lernejestro lin kuraĝigis; eĉ persone vizitis la gepatrojn por persvadi ilin fari la necesan streĉon kaj oferon. En favoraj circumstancoj tio estus elĉerpe malfacila sed por la familio de senlaborulo ĝi estis tute malebla. Sando estis tiel amema kiel la plej oferema patro. Li tion klarigis al la instruisto; sed ĉu gepatroj kies sola enspezo estas la mizera ŝtata subvencio, povus subteni laborkapablan junulon ĉe lernejoj dum sep jaroj? Nenio plu direbla. Li fariĝis laboristo en la sama fabrikejo kie oni forbaris lian patron. Sed kvankam li ludis futbalon en la fabrikeja ludantaro, kio tre fierigis lian patron, neniam li volis provi fariĝi profesia ludanto.

Dek jarojn post la naskiĝo de pli juna filino la nun pli ol mezaĝa sinjorino Makferso surprizis ĉiujn per la nasko de dua filo. La novuleto estis dorlotata de ĉiuj. Vivo estis nun pli facila. "Mi povas nur ĝui mian trian", deklaris S-ino Makferso, "ĉar de ĉiu flanko venas helpo — mi nur bedaŭras ke mi ne estas juna edzino kun la unua infano; li havos pli bonan vivon ol se li naskiĝis antaŭe dum la grizaj tagoj de senlaboro kaj malsateco", ŝi kontraŭstaris la edzan proponon nomi lin same kiel tiama futbalisto kaj insistis nomi lin Alberto honore al sia avo. Ĉi ties portreton ŝi konservis super la kamenbreto kun moto kiun la respektindulo propramane pentris laŭ kurba formo — "Panon kaj Rozojn". Tio estis titolo de lia plej amata socialista himno. Alberto Mercer fariĝis legenda figuro en la lokaj laboristosindikataj rondoj.

Lian unuan intertrakton kun la granda S-ro Henrio, posedanto de la ŝpinejo oni ofte poste pri-skribis. Alberto kun alia ŝpinisto estis irinta en la oficejon por peti, ke salajroj estu pagataj ĉiu-semajne anstataŭ dusemajne. La fortika Henrio ekkaptis ilin po unu en ĉiu mano kaj elĵetis ilin sur la betonon ekstere. La postan tagon, kun bandaĝo sur kontuzo, Alberto revenis kun po unu viro kaj virino el la kvar fakoj de la laborejo. La salajroj pagiĝis semajne. Sed Alberto pensis pri pli ol salajroj. Li kutimis fini siajn paroladojn, "Sed, gekamaradoj, ni strebas al pli bonaj kondiĉoj ne nur por niaj ventroj sed por niaj spiritoj, por la rozoj de la vivo. Aŭskultu miajn vortojn; kiam estos kreita pli justa ordo niaj genepoj, se ne ni, vidos tian ekfloron de la artoj, sciencoj, kaj kulturo, kian la mondo ankoraŭ neniam vidis. Panon kaj rozojn, kamaradoj, panon kaj rozojn!"

Oni povus supozi ke la nova eta Alberto indulgita de la gefratoj, la geonkloj, kaj ĉiuj ceteraj parencoj, kreskus tro-dorlotata egoista bubaĉo, sed ne. Vere estis, ke unu tagon kiam li estis trijaraĝa, kolerema maljunulo nomis lin infanaĉo, "Kiel ĉiu alia". La etulo estis, kvankam ne tre forta, vigla kaj inteligenta. Kiam li veturis omnibuse li ĉiam sidis en la imperialo, se eble sur la loko plej antaŭa, kie etulo povus rigardi ĉiudirekten tra la vitroj. Ĉifoje, tamen, li trovis, ke ĉiuj la antaŭaj lokoj estis okupitaj, kio igis lin plendi, ĝis maljunulo sin turnis dirante. "Plendu ĝissate. Vi modernaj infanaĉoj ricevas la senpagan lakton, la oranĝojn, la ŝtatan subvencion, kaj ĉion ceteron, sed mi estu damnata se vi ricevos mian sidlokon". Sed tio estas malofta escepto. Ordinare la feliĉa temperamento de la knabeto igis lin ŝatata en ĉiu medio. Ĉe la lernejo li fariĝis la fiero de sia instruisto, kaj lia patro miris kiel rapide li parkerigis ĉiun informon pri la nacia sporto per kiu li regalis lin. Kiam gasto ĉeestis la patro invitadis lin provi la scion de la infaneto pri futbalo per ĉiaj demandoj. Li kompreneble kunprenis lin kelkfoje al futballudoj, eĉ kvankam tio ĝenis lian propran ĝuon, ĉar dum la ekscito de spektado Sando fariĝis iom nu, elokventa, kaj tia vortaro ne taŭgis al lerneja knabeto.

Hodiaŭ, tamen, la sabaton post la argumento en la trinkejo, Sando ne kunprenis sian fileton. La unuan fojon en multaj jaroj la trafantoj atingis la lastan decidludon en la Pokalserio. La ludo devas fariĝi en la grandurbo, kvardek mejlojn for. Sara, bofratino de Sando, loĝantino de la grandurbo, estis invitinta sian fratinon veni por la semajnfino. Vere, Sando ne tre amike rilatis al sia akra-lingva boparencino. Ŝi ne hezitis miri aŭdeble pri "la vanteco de plenkreskaj viroj kiuj malŝparas tempon kaj monon por regule gapi sub pluvo, neĝo, aŭ kia ajn vetero, al aro da junuloj postkurantaj nuran pilkon". Tamen la okazo estis taŭga. Internacia ludo okazos post monato en Londono kiam "Skotlando" ludos kontraŭ "Anglujo". Ne plu la

simplaj laboristoj devis rezigni pri tiaj multekostaj vojaĝoj. Bezona nun estis la produktaĵo de la industrio enlande kaj eksterlande. Post dua mondmilito la neevoluintaj landoj, kun milionoj da malsatantaj enloĝantoj luktantaj ne nur por la ĉiutaga pano, sed ankaŭ por la novaj maŝinoj kaj teknikoj, devis sin turni preskaŭ kiel almozuloj al la delonge industriigitaj landoj. Ĉi tiuj povis, almenaŭ provizore, dikti kondiĉojn kaj prezojn, kaj eĉ la Makfersoj, tio estas, la ordinara laboristoj, scie—nescie partoprenis la avantaĝojn de tiu pozicio. Ne plu povus esti parolo pri maldungo pro laborforresto: aliaj fabrikoj estis ĉiam pretaj dungi liberajn laboristojn. Nia Sando, do, nepre volis fari la longan vojaĝon por plenpulme kuraĝigi "sian" teamon, sed la postulo por enirbiletoj estis tioma, ke oni avare disdividis ilin inter la multaj kluboj. Ĉe la grandurbo Sando esperis ricevi unu-du biletojn. Vendo komenciĝos tie tiun matenon antaŭ ol li povos atingi tien. La edzino kaj fileto do, profitante la inviton de la bofratino, iru frumatene, eĉ antaŭ la vendo komenciĝos, por atingi altan lokon en la atendantaro kiu certe frue kolektiĝos. Aĉetinte la biletojn, ili iru al la fratino kien Sando venos post la fino de la ludo en la posttagmezo.

La Trafantoj perfidis sian titolon; en la unua ludduono la kontraŭuloj dufoje enbatis la pilkon en ilian golejon dum la Trafantoj nenion atingis. Dum la paŭzo Sando fariĝis la centro de varmegaj argumentoj pri diversaj punktoj de la ludo. Amiko ektiris lian manikon, "Jen, oni vokas vin per la laŭtparolilo".

"Vokis min?" "Jes, vin, sed vi kriis tiel laŭte, ke vi ne povis aŭdi ion ceteran. Jen aŭskultu, oni petas vin iri tuj al la oficejo". "Nova sperto por mi", grumblis Sando. Gardu mian lokon; mi ne volas maltrafi la komenciĝon de la dua duono ĉar tiam la Trafantoj balaos la grundon per tiuj verdĉemizuloj".

Sed kompatinda Sando ne vidis la reston de tiu ludo.... Dek minutojn poste li staris pala, kun sufokosento, antaŭ malsanulejo. "Fakon C", li balbutis al la pedelo, "La pedelo tuj elvenis de malantaŭ sia ĝiceto. Ĉu vi scias ion precizan? Oni diris al mi, ke akcidento okazis...." La pedelo respondis, "Oni diros al vi interne; mi efektive ne scias". Turmentaj momentoj. Ĉe la pordo al Fakon C la pedelo petis lin atendi. Sando per ekvido, konstatis, ke estas flegejo por infanoj. "Do, estas mia fileto", li pensis. Ĉefflegistino elvenis. "Ĉu li grave vundiĝis?" Ŝi ne respondis la demandon; nur, "Sekvu min. La Estrino deziras paroli kun vi". Mallonga iro, sed al Sando, ĝi ŝajnis senfina. Strange, sed kvankam li kvazaŭ sonĝe postiris la uniforme vestitan flegistinon, li povis poste memori multajn etajn detalajn de la loko... Li staris antaŭ la Estrino. "Sidigu S-ro Makfero; mi bedaŭras, ke mi devas averti vin prepari aŭdi afliktan novaĵon. Via filo.... jam mortis. Li tute ne

Venas vespero, verŝas la sun'
ruĝajn radiojn sur tera surfaco,
brilon de lumo-sopiroj el spaco;
montoj serenas. En or' kaj latun'
ardas kupoloj, sed pli en la fono
ondas nebuloj trans kampa blu-tono,
kiel antaŭe forgeso laŭ val',
kiun jam kovras miljara vual'.

En la vespera varm'
zumas la homo-svarm',
kanto kaj korn-muzik',
floroj, okula pik'. —

Grandoj pratempaj atendas en rondo,
apenaŭ konataj de l' mondo.

Vespro sonoras, en ruĝa kolor'
fumo ofera de l' tonoj disiĝas,
sankta preĝeja krepusk' etendiĝas,
preĝoj tremetas en vort' kaj odor'.
Super Sabinoj lum-zono girlandas,
fajroj paŝtistaj Campagna'n enrandas.
Romo kun lampoj ekbrilas sen fort',
kvazaŭ legend' el pratempa mort'.

En la vespera hel'
dancas jen saltarel'; —
krakas fajraĵa ŝut',
rido kaj "morra"-lud'; —

pensoj en tonoj kaj farmoj instigas
fide al kio pacigas.

Lukton sensonan jam perdis la lum',
bluajn arkaĵojn transvolbas ĉielo,
el la eterno ekflamas la steloj,
sinkas la ter' en nebulo kaj fum'.
Fuĝas okuloj al urbaj lum-sorĉoj,
trafas funebran hom-vicon kun torĉoj,
nokton serĉantan, sed flirtas lum-flag'
kvazaŭ esper' de l' eterna tag'.

Gaje la mandolin'
sonas al danc' kaj vin'.
Bruon de karnaval'
rompas vesper-signal'; —

Tra la revema pulsado de l' menso
brilas taglum' en la penso.

Nun trankviliĝas, sed blua eĉ pli,
vigle atendas ĉielo. Ĉe limo
de reva pratempo, futura proksimo —
lumoj necertaj en griza medi'.
Sed — ili kuniĝos, kaj Rom' lumigite
brilos por regno Itala subite:
krakos kanonoj, sonoros de l' mont',
flamos memoroj sur blu' de l' estont'. —

Supren al fenestrar'
de nov-geedza par'
sonas flut-ludo al
kanto de menestral'.

Fortaj sopiroj infane dormadas —
feblaj ridete paradas.

Bjørnstjerne Bjørnson (1832-1910) Muziko: Edv. Grieg. (Poemoj kaj kantoj 1870)

Henry Fridèn

Klarigoj: Monte Pincio (elp. Monte Pinĉo) — altaĵo super Romo, la promenejo de la urbo, kie ludas la muziko kaj la nobelaro renkontiĝas ĉiun vesperon. Marmoraj bustoj de famaj viroj el la Itala historio staras ĉirkaŭ la placo de Monte Pincio. Sabinoj — montaro ekstere de Romo.

suferis". Ŝi aldonis rapide: "Li estis senkonscia kiam li alvenis ĉi tien. La polico raportos al vi pri tio, kiel la akcidento okazis, sed ŝajnas, ke via edzino kaj filo iel trafis en vicon de futbal-fanatikuloj. Ekestis interpuŝiĝo pri la ĝusta vico, aŭ simile, kaj tumulto sekvis. Rajdpolicistojn oni tuj vokis. Sed malgraŭ la klopodado de via edzino la etulo estis teren batita kaj piedpremita. Via edzino ne multe suferis fizike, sed ni igis ŝin ekkuŝi. Vi povas kunpreni ŝin nun se vi volas".

Sara sugestis, ke ŝia fratino restu kun ŝi kelkajn tagojn ĝis post la enterigo, sed S-ino Macferso volis hejmen jam lundmatene. Kontraste kun ŝia edzo, kiu post la unua ŝoko, trovis senpeziĝon ripetadante la samajn demandojn kaj rakontojn, la edzino ne povis unu vorton diri pri io rilate la teruran okazintaĵon. Per fiakro, en akompano de Sara ili celis la stacidomon en la mateno. Subite S-ino Makferso, sidinte mutmizere ĉe la fenestro-Sando, "Sed efektive, estas la natura vojo al la terura loko? For! For!!" Estis ĝuste tiu futbalejo ĉe kiu ŝi atendis sabatmatene. "Bedaŭre", diris Sando, "Sed efektive, estas la natura vojo el la stacidomo; vi devas regi vin, edzino; oni devas tamen pluvivi. Sed mi ne komprenas la vicon tie.

Nepre ĉiu bileto estus vendita sabate". Li atentigis la ŝoforon. "Oni rekomencas vendi por la internacia ludo, ĉar la polico ĉesigis tion sabate pro malordo okazinte tie". Ili estis ĵus preterpasintaj la longan vicon. Sando flustris al la ŝoforo. La fiakro haltis. Sara, konsolante sian fratinon apenaŭ rimarkis kiel Sando elsaltis. Li preterpasis la aron da policistoj kiuj deĵoris laŭlonge de la vico kaj iris rekte al la plejantaŭo kaj kriis al ĉiu ĝenerala, "Ĉu iu kam'rado bonvolos cedi sian lokon?" Kelkaj ridis sarkasme sed ĉe unu Sando kredis vidi esperon. Li alpaŝis kaj mallaŭte klarigis. La juna viro rigardis lin strange kaj diris kvazaŭ al si, "Tio.... kaj li tamen ankoraŭ deziras...." Li rigardis antaŭ si momente, poste kun subita decido ekpaŝis el la vico, kaj same rapide Sando ekokupis lian lokon. La juna viro sin turnis. "Nu... "Kam'rado" plaĉas al mi jen kaj jen spekti ludon; eble mi estis povonta pro kutimo fariĝi tia kia vi, sed danko al vi, S-ro Averta, tia je Dio, mi neniam fariĝos. Mi aŭdis diri, ke "Religio estas la opio de la popolo" sed ĉu la modo ŝanĝiĝis? Ĉu vere ankoraŭ religio?"

Tom Fraser

Novaj Libroj

Duope ricevatajn verkojn ni recenzas; unuope ricevatajn ni nur mencias.

*) ricevebla ĉe U.E.A.

TAGLIBRO DE ANNE FRANK (*La Postdomo*). 12 junio 1942 — 1 aŭgusto 1944. El la nederlanda originalo tradukis G. J. Degenkamp. 219 paĝoj, 13,5 × 19,5 cm. Kun sep tutaĝaj ilustraĵoj kaj situplanoj de la "Postdomo". Tole bindita, kun ora surpriso. Prezo gld. 7,80 aŭ 2.15 dol. Eldono: Heroldo de Esperanto, Harstenhoekweg 223, Scheveningen, Nederlando.

La plej fama taglibro de nia generacio fine en Esperanto post jama apero en sennombraj lingvoj. Neordinara verko kun neordinara posthistorio, pri kies ekstremoj oni prefere legu en la revuo de la eldonanto.

Legante tiujn ĉi paĝojn de knabino 13- ĝis 15-jara oni fojon post fojo sentas emociojn kaj miron. Kiel povas infano esprimi sin tiel mature? Vere, la nazioj ne nur mortigis infanon, sed burĝonan verkistinon. Ili kredis silentigi, sed kie ili mem nun estas, dum milionoj en la tuta mondo legas la optimismen, homaman testamenton de gracila knabineto:

"Malgraŭ ĉio mi kroĉas min al miaj esperoj, ĉar ankoraŭ mi kredas je la interna boneco de la homo. Estas al mi nepre ne eble konstrui ĉion sur la bazo de morto, mizero kaj konfuzo. Mi vidas, kiel iom post iom la mondo estas rekreata en dezerton; pli kaj pli laŭta mi aŭdas la alruliĝantan tondradon, kiu minacas mortigi ankaŭ nin; mi partoprenas la suferadon de milionoj da homoj. Kaj tamen, rigardante al la firmamento, mi fidus, ke finfine ĉio refariĝos bona, ke ankaŭ finiĝos tiu ĉi kruela tempo, ke denove ekregos en la mondsocio trankvilo kaj paco. Intertempe mi devas alte gardi miajn idealojn; en tempoj venontaj ili eble tamen estos realigeblaj" (15/7 1944).

Hazarda donaco naskiĝofesta inspiris Anne por ekverkado, kaj ŝi elektis formon pure personan, ĉiam parolante rekte al sia taglibro kiel al longe sopirita amikino, eĉ kun la personnomo: Kitty!

La atmosfero de Nederlando sub prema okupado estas konstanta kaj kruda fono de tiu ĉi kronikado. Ni kvazaŭ sentas la mallumon, la nesekurecon, nejustecon ĝis la spino. Judoj precipe suferas. Okazas sistema diskriminacio kaj humiligo per deviga porto de flava stelo, kaj la okupanto konscie celas al ilia fizika neniigo. Laŭ tute hazarda elekto oni sendas aron

post aro al plej teruraj koncentrejoj. Nur per komuna solidaro kaj helpe de bravaj, nejudaj civitanoj negrandaj nombroj sukcesas sin kaŝi, kaj ofte nur provizore, ĉar ankaŭ en la kaŝloĝejoj ili baldaŭ frontas sennombrajn, danĝerajn problemojn.

Pri tia kaŝloĝado dum du jaroj, kiel oni vivis, manĝis, parolis, detale raportas Anne Frank. Ok homoj vegetas malantaŭ nefortika ŝirmo de sekreta pordo en "postdomo" amsterdama; du familioj, kies intimajojn ni observas de tago al tago, en ĝojo, disputo, festo, funebro. Ankaŭ la adoleskan evoluon de la gejunuloj Anne kaj Peter ni sekvas tra senkaŝa, tamen delikata priskribado. Tra tiuj ĉi trembrilaj bildoj de troigita sento, revado, enamiĝo elstaras figuro de tolerema, aminda patro, kiu merite estas por Anne la idealo.

La rakontado kulminas en kelkaj detektive streĉaj epizodoj: pluraj vizitoj de rompŝtelistoj, kiuj senskrupule profitas la senesperan staton de kaŝloĝantoj, ĉar tiuj kompreneble ne kuraĝas anonci krimojn ĉe la polico. Kredeble ĝuste tiuj fiagoj kondukas al malkovro kaj baldaŭa pereco en la neniigejo Bergen-Belsen. Nur la patro revenis kaj ankoraŭ vivas.

Ne per la taglibro, sed per la persista laboro de germana ĵurnalistino, kiu intervjuis 42 nederlandanojn kaj germanojn kun rilato al la familio Frank, ni nun scias, ke Anne ne mortis kiel plej multaj pro malsato, trolaboro aŭ per gasa ekzekuto, sed pro tifo du monatojn antaŭ ol finiĝis la milito. Unue mortis la fratino Margot, kaj Anne restis sola, ĉar la gepatrojn oni sendis al la koncentrejo Auschwitz. Ŝiaj kunuloj rakontas, ke ĉiam ŝi estis ekzemplo por aliaj pro sia kuraĝo, helpemo kaj bonhumoro.

Per tiu ĉi verko nia literaturo riĉiĝis je ankoraŭ unu klasikaĵo, tre rekomendinda. La esperantigo de Degenkamp el la nederlanda originalo efikas perfekta kaj flua. Sendube antaŭiris zorga lingva reviziado, ĉar preskaŭ nenio estas eble trovi lingvan dubaĵon nek preseraron, kaj ĉie akompanas la tekston tuja piednota klarigado. Kun intereso oni konstata aplikon de multaj t.n. ĉiutagaj esprimoj por objektoj kaj ideoj ne ofte praktikataj, ĉar kredeble la internacia lingvo pli ol aliaj havas skriban uzon.

La ekstera prezento de la libro estas agrabla kaj digna, sola kritiketo estu, ke oni elektis iom densan tipografion kun tro malgrandaj literoj.

Poul Thorsen

MISTERO MINORA aŭ "Tiel Okazis" de Ferenc Szilágyi. Originala romano; 120 pĝ., 13 × 21 cm, helgriza bindo kun vinjeto. Prezo 12 danaj Kr.

Jen nova verko en la Koko-serio, kiu jam famiĝis pro la kvalito, interna same kiel ekstera, de la tri unuaj eldonaĵoj: la fajne ĉizita poemaro de P. Thorsen "Rozoj kaj Urtikoj", la konciz-arteca fablaro de K. Kalocsay "Ezopa Saĝo", kaj la novelaro de J. H. Rosbach "Homoj kaj Riveroj", kie la originaleco de la psikologio, la lerteco de la fabelado kaj la ĝusteco de la stilo vekas kaj intereson kaj ŝaton.

Tute alispeca estas la romano de Szilágyi. Ĝi respegulas evidente la atmosferon, en kiu vivis la aŭtoro mem, sed ankaŭ evidente ĝi estas neniel biografieca. La eldonisto reklamas ĝin kiel "krimpsikologia": fakte mi ne scias, ĉu estas ia aparta psikologio de la krimo, sed ĉi tie ververe enestas nek krimo, nek krimeca psikologio. Tia reklamo riskas malutili pli ol profiti: la leganto trovos en la romano ne tion, kion oni anoncas al li.

Anstataŭe li trovos ion alian, tre interesan pentradon de psika krizo: unu "fiksa ideo" iom post iom penetras kaj ekposedas la spiriton de junulo, kaj kondukas lin preskaŭ ĝis la limoj de la frenezo. La progresado de la malsano, ĝiaj malproksimaj kaŭzoj, la favoranta kondiĉaro, ĉio estas tre ĝuste kaj precize indikita, kun tiu kroma art-efekto, ke estas la malsanulo mem, kiu rakontas sian travivaĵon; tiel ni iom post iom konatiĝas kun li kiel kun amiko, ni malkovras per tia kunvivado liajn kvalitojn kaj malfortojn, lian iom deliran melanĉolion, liajn muzikajn halucinaĵojn, lian neforviŝeblan fidelecon al junaĝa amo.

Juna hungaro, do, post la sangaj okazaĵoj de la mondmilito, rifuĝis en Svedujon; tie, en la izoliteco de la ekzilo, li forlasas sin al la memoroj de sia adoleskeco, al la sopirado pri perdita amatino. La viva figuro de tiu hungara knabino, kaprica, facila kaj ĉarma, identiĝas, en lia spirito, kun fragmento de kanzono, kelkaj iom stultaj versoj, kies ario longe kaj loge resonas en li. Kaj ĉirkaŭ tiu arieto, okaze reaŭdita en la fluo de moderna komponaĵo, kristaliĝas ĉiuj malcertoj, ĉiuj duboj, ĉiuj suspektoj de tiu malekvilibra animo. Li persvadas al si, ke la komponisto konis lian amatinon, kaj iel mortigis ŝin. Mi ne rakontos la finon de la historio; sed la iom-post-ioma naskiĝo, kreskado kaj florado de tiu obseda ideo estas priskribita kun vereco kaj potenco. Interalie, oni trovas, en kelkaj paĝoj, unu analizon, pli

ĝuste unu transponon per vortoj de muzikaj motivoj, kiu estas unu el la plej brilaj pecoj, kiujn mi iam legis — kaj ne nur en Esperanto.

La lingvo estas bona; tamen kelkaj vortoj ŝajnis al mi ne tute ĝuste uzataj (p. 12: akaparas = akumulas; 53: agordo = akordo; 56: inici ion al iu = iun en ion; 60 adepto = disĉiplo; 66: kodekso = kodo ktp.); kelkaj formoj modifindaj (45: **metuŝalema** estas kunmiksado inter la zamenhofa **metuŝelaha** kaj la latina **matuzalema**; 50: **samaritana**, laŭ la esp-a Biblio: **samaritana** ktp); kelkaj kunmetoj estas kritikablaj (p. 5: **Kristfestrado** povus esti dissendo okaze de iu ajn kristana festo, ne nepre la kristnaska; 68: **cerbspiralo** — mi ne komprenas); du tri fojojn oni povus ĉikani pri la uzo de la reflektivo. Sed kompanse ne mankas la originalaj esprimoj ("mia kredo ne estas 24-karata", "ŝi ne opinias min iu kiu-ajn", "eĉ mia vivinstinkto miskonektiĝis" ktp), nek kelkaj eble dezirindaj neologismoj (la aŭtoro ŝajne havas inklinon al la pseŭdo-sufikso -ento: **dirigento** de orkestro, **komponento** de atmosfero...).

Cetere la romanon oni legas avide, ne nur por la distro, sed ankaŭ pro la plezuro retrovi en ĝi la revemon, la sentivecon, la delikatecon de tiu simpatia verkinto.

G. Waringhien

ESPERANTA LEGOLIBRO: Elio Migliorini, reviziita kaj pligrandigita. 214 p. Eldonis Paolet, San Vito al Tagliamento, Italio. Prezo: 500 lirojn.

Krestomatiaj ŝajne havas mision. Sub rekomendo de Itala Instituto de Esperanto jam aperas tiu ĉi legolibro en kvara eldono. Elio Migliorini estas universitata profesoro pri geografio kaj jam de multaj jaroj utiligas la internacian lingvon kolektante materialon por ampleksaj geografiaj publikaĵoj. Tre kompetente li faris elekton kaj dividon jenan: 1) Tra la vivo, 2) Tra la lingvo, 3) Tra la literaturo. Forfalis kelkaj pecoj, sed novaj estas de i.a. Lapenna, Collinson, Engholm, Delor, Ibsen, Auld, Minnaja kaj Urbanova, ĉefe ĉerpitaj el Revuo Esperanto.

Estas tre interese fari stilan komparon inter Kalocsay-traduko de 1925 kaj de 1957 pri Sapfo: Amkonfeso. Entute korekta kaj simpatia libreto. Nur oni povus elekti ankoraŭ pli da kontribuoj de pli novaj poetoj — kaj al la recenziinto ŝajnas, ke la kovrilo de la tria eldono kun sia simpla tipografio efikas pli agrable ol la ĉi-voluma, efemera ornamo.

Roma Thorsen

Ĉar la redakcio okaze de iu recenzo ricevis proteston pro ties enhavo, ni atentigas, ke la recenzaĵoj esprimas la opiniojn nur de la recenzintoj, ne tiujn de la redakcio.

Red.



44-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Varsovio — Pollando

1-8 aŭgusto 1959

JUBILEA ZAMENHOFA JARO

Sub honora protektado de la Ministro-Prezidanto de Pola Popola Respubliko JOZEF CYRANKIEWICZ

Adreso: 44-a Universala Kongreso de Esperanto, Varsovio.

Telegramoj: Esperanto-Kongreso, Warszawa.

Banko: Narodowy Bank Polski, Warszawa, VII O.M. nr. 1531-9-525.

N-ro 7

Aprilo 1959

MONATA KOMUNIKO

Novaj fakkunvenoj:

Anoncas fakkunvenojn:

- Studenta Tutmonda Esperantista Ligo. Adreso: J. C. Wells, Trinity College, Cambridge, Britujo.
- Internacio de Militrezistantoj. Adreso: S-ro A. G. Tucker, Birchcroft, Pilgrims Way, Harbledown, Canterbury, Britujo.
- Esperanta Sakligo Internacia. Adreso: D-ro V. Faigl, Zlonice, Ĉeĥoslovakio.

Fervoja rabato:

La 33%-a fervoja rabato de la polaj fervojoj estas ricevebla je aĉeto de la vojaĝbileto, en la koncerna lando, kontraŭ prezento de la kongreskarto. La polaj fervojoj jam informis la direktojn de la eksterlandaj fervojoj per letero de la 5-a de marto CZP. 14/25/7/59.

Bankedo:

La Loka Kongresa Komitato decidis, ke dum la U.K. okazu komuna bankedo. La prezo estas fiksita je \$ 2.50 zł).

Kongresa radio:

Informoj pri la kongresaj preparoj estas donataj ĉiusabate en la radio-disendo "Voĉo de la 44-a", kiu okazas en la kadro de la ĉiutaga duonhora programo en Esperanto de la Pola Radio sur mallongaj ondoj 25,05 m, 25,20 m, 25,39 m., 30,98 m., 31,45 m., 31,50 m., 41,12 m., 42,11 m., kaj sur mezaj ondoj 249 m. / 1205 kc/s/ de la 16,30 h. ĝis la 17-a h.

Statistiko:

(ĝis fino de marto): Afriko Suda 1, Arabujo 1, Argentino 2, Aŭstralio 3, Aŭstrujo 32, Belgujo 22, Brazilo 4, Britujo 80, Bulgarujo 123, Ĉeĥoslovakio 5, Cejlono 1, Danlando 46, Etiopio 1, Finnlando 30, Francujo 130, Germanujo 76, Hispanujo 9, Hungarujo 14, Indonezio 1, Islando 2, Italujo 93, Izraelo 4, Japanujo 3, Jugoslavio 35, Kanado 2, Maroko 4, Meksiko 2, Monako 5, Nederlando 66, Norvegujo 16, Novze- lando 5, Pollando 951, Portugalio 2, Rumanujo 2, Sovetunio 14, Svedujo 107, Svisujo 24, Turkujo 3, Urugvajo 1, Usono 13. Entute 1935 el 40 landoj. (Pasintjare 1447 el 33 landoj).

G. C. Fighiera

Konstanta Kongresa Sekretario

Varsovio, la 3-an de marto 1959

Al ĉiuj Landaj kaj Fakaj Asocioj.

Al S.A.T.

Al individuaj esperantistoj en landoj sen organizita Asocio.

Karaj amikoj.

Kiel vi jam legis en la monataj komunikaĵoj, unu plena tago de la Universal Kongreso estos dediĉita al la kulminaj tutmondaj celebrazoj de la Jubilea Zamenhofa Jaro.

Plej solenaj estos la solenoj antaŭ la Tombo de la kreinto de Esperanto, D-ro L. L. Zamenhof. Estas planate, ke en tiu cirkonstanco ĉiu Esperanto-organizaĵo kaj ĉiu kongresano deponu flor-omaĝon ĉe la piedoj de la Tombo. Plej unue preterpasos la Tombon asociaj kaj landaj delegacioj, kiuj metos florkronojn kun dediĉaj subskriboj.

La tuta rememora momento estos des pli grava se senescepte ĉiuj landoj estos reprezentitaj antaŭ la Tombo. Ĉar la sendado de florkronoj el eksterlando estas komplika kaj multekosta, ni kompleze estas je dispono de ĉiu ricevinto de la nuna cirkulero por pretigi en Varsovio mem florkronojn laŭ instrukcioj de la mendantoj.

Por via ĝenerala orientiĝo, ni komunikas bazajn prezojn de florkronoj kune kun surbenda surskribo:

Granda florkrono (diametro: ĉ. 1 m — rozoj) 63 dol.

Mezgranda florkrono (diametro: c. 1 m — gladioloj kaj rozoj) 42 dol.

Malgranda florkrono (diametro: ĉ. 1 m — kampaj kaj kreskigejaj floroj) 21 dol.

La surskriboj prefere estu tute mallongaj kaj nur enhavu dediĉon "Al D-ro Zamenhof" kaj subskribon. Estus ankaŭ preferinde, ke la landaj asocioj subskribu ne en la nomo de la organizaĵo, sed en tiu de la landa esperantistaro (ekz. francaj, britaj, rusaj, arabaj ktp. esperantistoj).

La sumon por la florkrono bonvolu transpagi al nia bankkonto:

Narodowy Bank Polski, Warszawa, VII, O.M. Nr 1531-9-525.

Ĉiun informpeton kaj korespondadon tiurilate bonvolu direkti al la Komisiito por la Zamenhof-Tago:

— Ing. E. Fethke, 44-a Universal Kongreso de Esperanto, Varsovio.

Ni transdonos ĝustatempe al vi konformajn sciigojn pri la ceremonio mem kaj pri la eventualaj salutvortoj.

Kun plej sinceraj bondeziroj por la Jubilea Jaro, ĝis revido en Varsovio!

Konstanta Kongresa Sekretario

G. C. Fighiera

Prezidanto de L.K.K.

Tra la Mondo

44-a UNIVERSALA KONGRESO DE ESPERANTO

Kongresaj radiodissendoj.

La Pola Radio decidis starigi ĉiutagajn duonhorajn dissendojn en Esperanto ek de la 4-a de aprilo 1959. En ties kadro la Loka Kongresa Komitato kreis rubrikon "Voĉo de la 44-a", kiu ĉiusabate disaŭdigas la plej gravajn kaj aktualajn informojn pri la Universala Kongreso en Varsovio. La radio-programoj en la Internacia Lingvo okazos ĉiutage de la 16,30 h. ĝis la 17-a h., mezeŭropa tempo, sur mallongaj ondoj 25,05 m., 25,20 m., 25,39 m., 30,98 m., 31,45 m., 31,50 m., 41,12 m., 42,11 m., kaj sur mezaj ondoj 249 m. (1205 kc/s.).

G. C. Fighiera,

Konstanta Kongresa Sekretario

Seminario por Ĉe-metodaj instruistoj

en kunligo kun la 44-a Universala Kongreso de Esperanto.
Varsovio (Polujo), 29 julio - 1 aŭg. '59.

LA ĈE-METODO

Jam de la jaro 1920 s-ro Andreo Ĉe kaj centoj da aliaj geinstruistoj gvidadas Esperanto-kursojn laŭ la nun jam famiĝinta metodo, de li ellaborita. Fakte estas, ke la Ĉe-metodaj kursoj ĉie havis kaj ankoraŭ havas tiel grandan sukceson, ke la plej multaj finiĝas kun pli da lernantoj, ol kiom estis ĉe la komenco. Kio estas la sekreto de tiu sukceso?

Unu el la principoj de la metodo estas, ke fremdlandano donu la kurson. Tio devigas la instruiston paroli Esperanton de la unua leciono. Tial li bezonas multajn demonstraĵajn objektojn, kiuj vivigas la instruadon.

La tuta kurso daŭras 40 horojn, kiujn oni povas dividi laŭvole. La metodo baziĝas ĉefe sur la principo paroligi la lernantojn, tiel ke ili post la finiĝo de la kurso povu fari simplan konversacion. Ĝuste tio tre entuziasmigas ilin, kaj instigas ilin sekvi ankoraŭ daŭrigan kurson por perfektigi en la lingvo.

LA SEMINARIO

La seminario, gvidota de s-ro Andreo Ĉe mem, okazos dum 4 tagoj (29-31 julio kaj 1 aŭgusto 1959) en amfiteatra salono de la Kongresejo (Palaco de Kulturo kaj Scienco) en Varsovio. La lecionhoroj en la unuaj tri tagoj: 9,30-13,00, 15,30-18,00 kaj 20,00-22,00; en la kvara tago, sabate: 9,30-13,00 kaj 15,30-18,00, ĉiam kun paŭzo en la mezo.

La aliĝon oni sendu al: Internacia Esperanto-Instituto, Riouwstraat 172, Den Haag, Nederlando.

La kotizo de la seminario, kun atesto pri partopreno, estas 43.— steloj aŭ 3.— dolaroj aŭ 72.— zlotoj. — Aliĝantoj loĝantaj en la okcidentaj lan-

doj pagu la kotizon rekte al la Internacia Esperanto-Instituto en Hago (poŝtkonto 162626), aŭ pere de la landaj reprezentantoj de Universala Ligo. — El Polujo kaj aliaj popoldemokratiaj landoj oni pagu al la Kongresa Oficejo en Varsovio 72 zlotojn aŭ egalvaloron.

Oni aliĝu kiel eble plej baldaŭ, por havi frue certecon pri la okazigo de la seminario, ĉar ĝi povos efektiviĝi nur, se aliĝos sufiĉe da partoprenantoj.

Julia Isbrucker

POR LA ESPERANTISTAJ STUDENTOJ

Ĉiujare, de novembro ĝis junio, la Katolika Universitato de Angers (Francujo), organizas por eksterlandaj gestudentoj, specialan perfektigan kurson de franca lingvo, parte praktikan, parte literaturan (kun fina ekzameno kaj diplomo).

La gvidanto de tiu kurso, sacerdote ROLAND, interesiĝis pri Esperanto kaj nun studas ĝin por eventuala helpa uzado de la Internacia Lingvo dum instruado.

Plie, en Angers, estas aktiva esperanta grupo. La kontaktoj kun la "franca vivo" estus do facilaj kaj agrablaj por eksterlandaj esperantistaj studentoj, kiuj venus en la urbo por perfektigi en studado de la franca lingvo.

Angers situas je 300 kilometroj sudokcidente de Parizo, en la valo de rivero Loire (je 40 kilometroj de la esperanta Kulturdomo de Grésillon).

Por informoj pri la kurso en Universitato dum 1959-1960, skribu rekte al:

Abbé P. ROLAND, aumônier, Université catholique, B.P. 201, ANGERS (Francujo).

Por kontakti la Esperanto-grupon, skribu al la sekretario:

S-ro A. FRANGEUL, 42, rue du Pré-Pigeon, ANGERS, Maine-et-Loire (Francujo).

B.N.: Ĉiuj gestudentoj, katolikaj aŭ ne, povas enskribiĝi.

KORESPONDA SERVO EN KOREO

Por ke eksterlandaj gesamideanoj povu korespondi kun koreanoj estas fondita Koresponda Servo por Koreo. Nun KSK atendas viajn fidindajn adresojn. Bonvolu komuniki: nomon, adreson, sekson, naskiĝdaton, profesion, ŝatokupon, specialajn dezirojn, nombron da dezirataj korespondantoj. Skribu al s-ro Jun Tai Kim, c/o Eun Sik Kim, Mun hwa song, Taegu, Koreo.

FOTOGRAFOJ! FOTOAMATOROJ!

La redakcio de "La Suda Stelo" aranĝas foto-konkurson sub la titolo:

MEDICINA LITERATURO EN INTERNACIA LINGVO

Tokio, aprilo (IGS/337). La ĵus aperinta bibliografio de la medicina literaturo en Esperanto, eldonita en Tokio, citas 147 medicinajn eseojn originale

"Landoj - vojaĝoj - homoj" kaj ni invitas al kunlaboro ĉiujn samideanojn kiuj sin profesie aŭ amatore okupas pri fotografado. Sendu al ni viajn plej sukcesajn fotojn faritajn dum ferioj, dum vojaĝoj, vizitoj, en via hejmloko kaj en familia rondo. La kadro de la konkurso estas tre vasta kaj ebligas grandnombran partoprenon. Ĉiu rajtas sendi maksimume 15 fotojn. El la kolektita foto-materialo la redakcio de LSS intencas aranĝi foto-ekspozicion kiu estos laŭ la deziro sendita al diversaj lokoj; krome ni publikigos multajn fotojn en nia revuo. Post la limdato estos aljuĝitaj ankaŭ kelkaj premioj. Rajton kontribui havas ĉiuj esperantistoj. La limdato estas la 1-a de septembro 1959.

Ĉiu sendita fotografaĵo devas esti almenaŭ 17 × 12 cm granda kaj devas esti akompanata de jenaj faktoj: Nomo kaj adreso (aŭ pseŭdonimo kun nomo kaj adreso en aparta koverto) de la aŭtoro, titolo de foto, jaro en kiu ĝi estas fotita, originala formato de filmo kaj informo: ĉu la aŭtoro estas profesia fotografo aŭ amatoro.

● Nova Esperanto-kurso en Hindujo. Bikšue Anuruddha Stahvira, Prezidanto de la Budhana Ligo Esperantista, nun laboras en la hindologia Instituto de Hoshiarpur (Punjabo), tre fama en Hindujo kaj ĉe la orientalistaj medioj. Li okupiĝas pri la eksterlandaj rilatoj kaj intencas enkonduki Esperanton en la filozofiajn kaj religiajn eldonojn de la Instituto, kiuj regule aperas en la hindolingvo. Li ĵus sukcesis malfermi esperanto-kurson, kiun sekvas eminentaj sanskritofakistoj. Ni kore gratulas nian fervoran samideanon. Ni petas de niaj legantoj, ke ili amase sendu karton, por komplimenti kaj kuraĝigi lin kaj liajn lernantojn, al tiu adreso: Bikšue Anuruddha Stahvira, V.V. Research Institute, P.O. Sadhu Ashram, Hoshiarpur, (Pb), India.

ESPERANTISTA PRINTEMPA RESTADO EN PERLORA

De la 1a ĝis la 15a de Junio.

Denove la Esperantista Klubo "Nord", de Oviedo (Hispanujo) aranĝas printempan restadon en Perlora kie, kiel pasintan jaron, geesperantistoj povos pasigi trankvilajn kaj samtempe agrablajn tagojn en plej samideanea atmosfero.

La hispanaj sindikatoj metas je nia dispono komfortan, ampleksan, kaj tamen malmultekostan restadejon, similan duaranga Hotelo.

Se vi deziras ĉeesti kaj bezonas informojn, petu ilin de ni kaj, tre volonte, ni klarigos al vi ĉion.

Luis Garcia Fernandez,
Prezidanto.

Radio - Babiloj

La Esperantistoj havas la dissendojn,
kiujn ili meritas.

„Songe apud propra radioaparato“

Homoj, kiuj ĉiutage havas la ĝojon, plezuron kaj distron povi aŭskulti radiodissendojn, ankaŭ la Esperanto-programojn, komprenas kiom mankas al samideano, kiu ne disponas pri radio-ricevilo. Eksciante el privata letero de nia konata verkisto, poeto kaj batalema kunlaboranto Julio Baghy, ke li malbone fartas, facile laciĝas kaj suferas pro astmospeca tusado, Nederlandaj gesamideanoj kompatis lin kaj speciale atentis pri la linioj: "Almenaŭ se mi havus radioaparaton por iom kaj iam distri min, sed por tia luksaĵo neniam mi havos monon. Antaŭ nelonge Radio Roma parolis pri mia dramo "Songe" kaj prezentis fragmenton el ĝi. Bedaŭrinde mi ne havis okazon aŭdi tion. Foje per magnetofonbendo mi mem parolis en la Radio Sofia kaj tiel amuze estus aŭskulti min mem". Pro tiu fragmento el la letero la sekretario de la "Nederlanda Centra Komitato Esperantista" sendis cirkuleron al la sekciaj estraroj de la organizoj kunlaborantaj en N.C.K.E. kun la peto kolekti monon por povi donaci radioaparaton al nia talentoplana hungara samideano, kiu kelkfoje estis en Nederlando por kursgvidi, paroladi kaj kortuŝe deklami, kio evidente ne forgesigis kaj post tiom da jaroj ankoraŭ mirakle postefikis: en kelkaj semajnoj estis kolektata sufiĉe da mono por povi havigi al Julio Baghy bonegan radioaparaton.

Ni esperas, ke li per ĝi havos multan plezuron kaj grandan ĝojon kaj eĉ inspiron por verki belajn radiodramojn kaj deklamaĵojn, kiujn li mem poste povos aŭskulti "songe apud propra radioaparato". Sanon kaj forton al nia granda samideano!

Prave la Nederlanda gazeto "De Esperantist" diris ĉi-rilate: "Esperanto estas ne nur lingvo, sed tutmonda amikeco!"

La radiodialogo „Du Generacioj“ Premiita kaj... dissendota!

La radiodialogo "Du Generacioj" de Sibe Sipke de Jong estis premiita en la Belarta Konkurso de U.E.A. dum la U.K. de Mainz en aŭgusto 1958-a. Ĝi estis unuafoje disaŭdigata en salono per magnetofona rubando okaze de Zamenhofrememorkunveno la 20-an de decembro 1958-a en Leeuwarden, kie tri gesamideanoj surbendigis ĝin. Alia (pro la limigita tempo mallongigita) prezento okazos la 9-an de aprilo 1959-a per Radio Zagreb (Jugoslavujo) je la 23.05-a horo (G.M.T.); ondo 264,7 m.

Tasko por Esperantistaj radio-amatoroj

Ni legis en "Nederlanda Esperantisto" la alvokon: "S-ro T. W. Kelly, fervora radio-amatoro, 39 Princep Street, Norseman, Western Australia (vok-signaloj VKGTK) deziras skriban kaj radian kontaktojn kun radio-amatoroj en la tuta mondo".

Ĝis la Esperanto-movado disponas pri propra radio-sendilo tiaj amatoroj povus dissendi surbendigatajn Esperanto-paroladojn, -deklamaĵojn, -dialogojn, -dramojn k.t.p. por popularigi Esperanton inter la amatoroj. Ek!

S. S. de Jong

LA INTERNACIAJ KONKURSOJ 1959

Stato je la 31-a de marto

Konkurso I

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Finnlando	1935	2270	117.31
2.	Belgujo	1480	1693	114.39
3.	Hispanujo	1999	1905	95.30
4.	Svedujo	6420	6030	93.93
5.	Britujo	6093	5660	92.89
6.	Svislando	1950	1765	90.51
7.	Nederlando	5119	4230	82.63
8.	Usono	2816	2320	82.39
9.	Francujo	7066	5656	80.05
10.	Danlando	2639	1980	75.03
11.	Italujo	3980	2775	69.72
12.	Pollando	6635	4490	67.67
13.	Norvegujo	1991	1230	61.78
14.	Germanujo	6951	3845	55.32
15.	Jugoslavio	5690	2430	42.71
16.	Brazilo	8255	2454	29.73

Konkurso II

	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1.	Japanujo	1150	2250	195.65
2.	Kanado	435	550	126.43
3.	Portugalujo	615	520	84.55
4.	Izraelo	255	180	70.59
5.	Islando	270	190	70.37
6.	Novzelando	878	600	68.34
7.	Urugvajo	325	195	60.—
8.	Aŭstralio	1280	716	55.94
9.	Sudafriko	215	115	53.49
10.	Aŭstrujo	1360	720	52.94
11.	Maroko	457	186	40.70
12.	Argentino	615	140	22.76

Ĉiu large pasu 100% en La Zamenhof-Jaro!

En la Centra Oficejo de U.E.A.

estas loko por

SUPERA OFICIST(IN)O

Postuloj: mezgrada instruiteco, perfekta lingvoscio esperanta, kapableco je tute memstara laboro gvida kaj koresponda, large scio pri la Esperanto-Movado kaj UEA, tiel ke estos eble en kazo de neceso anstataŭi la direktorinon.

Propramane skribitaj leteroj kun vivpriskribo, fotokopioj de diplomoj, laŭ ebleco atestiloj pri antaŭaj postenoj, rekomendoj, foto kaj mencio de dezirata salajro kiel eble plej baldaŭ al la Direktorino de la Centra Oficejo, Eendrachtsweg 7, Rotterdam, Nederlando.

N.B. Nenederlandanoj atentu ke estas eble ricevi laborpermeson nur por personoj, kiuj povas laŭleĝe forlasi sian landon kaj laŭleĝe reveni al ĝi.

Esperantista Vivo

ADRESSANGOJ

Smith. — Oni bonvolu noti la novan adreson de S-ro Norman R. Smith, komitatano de U.E.A., help-sekretario de la Internacia Organiza Komitato, sekretario de la Komisiono Oriento-Okcidento: 75 South Ealing Road, South Ealing, London. W. 5, Britujo.

B. Monkiewicz, komitatano de U.E.A., loĝas nun: Warszawa-Żoliborz 32, ul. Filarecka 3 m. 16.

GEEDZIGOJ

Santamaría-Morales. — la estrarano de U.E.S. s-ro Eliseo Pérez Santamaría edziĝis al f-ino Elisa Cruz Morales, la 28.1.59.

Survoje al la miliono

En la daŭro de la unua monato la poŝtmarkkolektado donis 500 stelojn = 12500 frankoj. 14 tagojn poste ni atingis 700. Pro verŝajnaj ŝanĝoj en la kurzo de la naciaj monoj eble estas preferinde kalkuli en steloj. Ĉe la komenco de nia kolektado unu stelo validis 25 frankojn. Atinginte 40.000 stelojn ni do estos efektivigintaj nian celon.

Verdire mi ne estis tiom optimisma atendi tiun monsumon dum unu jaro. Mi skribis: "— se 500 esperantistoj fervore kolektadas". Ĝis nun 50 sendis sian kontribuadon, kaj multaj promesis daŭran sendadon. Venis multaj leteroj kun gratuloj kaj optimismaj atendoj. Kelkloke oni kolektas inter klubanoj. Gimnazia profesoro d-ro J. Kondor, Germanujo skribas: "Kun ĝojo mi legis la alvokon en "Esperanto". Mi tuj sendas pli ol 200 pm. kaj nun faras grandskalan kolektadon inter miaj gelernantoj. Pri la kampanjo mi faris anoncon, kiun mi metis en la oficialan lernejan subvitran anonckeston, akompaninte ĝin kun konciza teksto pri la jubilea jaro". Jen imitinda ekzemplo.

Ĉiuj sendintoj, escepte de kelkaj, kies adresoj estis nelegeblaj, ricevis mimeografitan dankleteron. En la decembra numero de "Esperanto" ni publikigos la nomojn de la kvin esperantistoj, kiuj atingis plej bonan rezulton. Tiuj kvin premiigos per libroj.

Mi respondas al demandintoj: Jes, ni akceptos ĉiajn poŝtmarkojn, uzitajn kaj neuzitajn, novajn kaj malnovajn, lavitajn kaj nelavitajn. Mem lavante la pm. oni ŝparas afrankon, sed tiam bonvolu zorgi, ke la pm. ne difektiĝas. Cifigitaj pm. plej ofte nenion valoras.

50 personoj sendis en la daŭro de ses semajnoj poŝtmarkojn, kiuj valoras 700 stelojn. 500 personoj povus do, dum unu jaro, sendi por 700 steloj oble 10 oble 8 = 56.000 steloj = pli ol unu miliono.

En la nomo de U.E.A. mi kore dankas al la sendintoj.

Peter Zacho

Peter Zacho

Randbølvej 4, Kopenhago F.

S-ro O. C. Lange, Kopenhago komitatano de U.E.A. kaj entute fervora kaj iniciatplena esperantisto, edziĝis la 11-an de aprilo al f-ino Grete Simoni, ankaŭ de Kopenhago.

Nekrologo

Menotti. — Mortis Rag. Ciro Menotti, librotenisto, multjara delegito de U.E.A. en Brescio, Italujo. R. C. Menotti estis fervora propagandisto kaj unu el la fondintoj de la loka grupo.

Maraury. — La unuan de Decembro, 1958, mortis en Málaga, Hispanujo, D-ro Roberto Maraury Barredo, dumviva membro de Universala Esperanto-Asocio.

Casas. — La 23.1.59 forpasis s-ro Pedro Casas, veterana esperantisto, iama UEA-del. dum multaj jaroj, profesia ĵurnalisto kiu multe propagandis kaj skribis pri Esperanto.

FROSTAVALLÉN

Denove ni memorigas vin pri la kultura Esperanto-semajno en Frostavallen dum la tempo, 9.-16-an de aŭgusto 1959, kie prelegos: prof. d-ro Ivo Lapenna, prof. d-ro N. Kawasaki, Japanujo, doc. S. Pragano, Nederlando, lic. Tibor Sekelj, Jugoslavio. Ĉiuj informoj estas haveblaj ĉe: s-ro Jan Strönné, Amiralsgatan 36, Malmö C, Svedujo. — Estas rekomendinde sin anonci al la kurso kiel eble plej baldaŭ.

RADIO

Ciujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

Por tempoj kaj ondlongoj, vidu la aprilan numeron.

Radio Sofia, nun disaŭdigas la dimanĉan programon per la jenaj ondlongoj: unua elsendo (19.00), 41.35 m., 39.11 m., dua elsendo (22.30), 49.42 m., 39.11 m. Por teĥnika plibonigo, bonvolu provi la tri ondlongojn kaj sendi precizajn raportojn pri aŭdebleco al la stacio: Radio-Sofia, Bulgarujo.

Radio Zagreb. 7-V, Memore al la Internacia Tago de Ruĝa Kruco; 14-V, Pri la festivalo de la Jugoslavia Esperanto-junularo; 21-V, Raportajo pri la I.F.E.F.-Kongreso; 28-V, Primovadaj novaĵoj kaj respondoj al la korespondantoj; 4-VI, Recenzoj pri la novaj libroj.

Radio Roma. 1-V, La Unua de Majo; 5-V, Tra la literaturo; 8-V, Itala sanktejo Pompei; 12-V, Leterkesto kaj bibliografio; 15-V, La tago de bonvolo; 19-V, Italaj kanzonoj en Esperanto; 22-V, Novaĵoj el Italujo; 26-V, Florenca muzika Majo; 29-V, La unua jarcento de la itala literaturo. Krome, ĉiun merkredon. Kuriero de Esperanto.

Radio Moskva jam disaŭdigis informojn pri Esperanto. Sugestoj, demandoj, petoj el eksterlandaj aŭskultantoj helpas la klopodojn de la sovetuniaj esperantistoj por starigi regulan programon. Skribu al: Radio Moskvo, U.S.S.R.

Pola Radio dissendas ĉiutage duonhoran programon en Esperanto je la horo 16,30 MET. Mallongaj ondoj 25,39, 30,98, 31,45, 31,50, 41,12, 42,11, 50,21. Mezaj ondoj 249 m. Voĉo de 44-a Universala Kongreso ĉiusabate samhore.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

EENDRACHTSWEG 7 ROTTERDAM C. NEDERLANDO

OFICIALA INFORMILO

La 1-an de aprilo 1959

N-ro 315

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de marto kaj ankaŭ por komparo je la fino de marto 1958:

	1958	1959
Asociaj membroj	5496	5085
Individuaj membroj		
MJ	554	644
MA	3827	4268
MS	458	454
Pat.	5	7
DM	302	334
HM	46	46
JMJ	9	15
JMA	74	126
	5275	5894
	10771	10979

DELEGITOJ

Britujo

Lochgelly (Fife) D : vakas.
Wirral (Cheshire) D : vakas.

Finnlando

Ilomantsi (Kuopion Lääni) FD (muziko baroka): S-ro T. Ilmari Haapalainen, pastro (luteri), Mekrijärvi.

Francujo

Antraigues sur Volane (Ardèche) D : vakas.

Chessy (Seine-et-Marne) FD (abelkulturo) : vakas.

Hispanujo

Valencia FD (literaturo) : vakas.

Italujo

Siena (Siena) D : vakas.

Nederlando

Dordrecht (Zuid-Holland) VD : vakas.

Purmerend (Noord-Holland) FD (librokomerco) : vakas.

Nov-Zelando

Wellington FD (plastikaĵoj) : vakas.

Pollando

Gdynia D : vakas.

Sud-Afriko

Bloemfontein (Oranje Vrystaat) D : vakas.

Svedujo

Åstorp (Skåne) D : vakas.

Göteborg FD (budhismo) : vakas.

Skövde (Västergötland) FD (aŭtomobiloj) : vakas.

Urugvajo

San José de Mayo VD : vakas.

FD (korespondado internacia): vakas.

Tala (Dpto Canelones) D : vakas.

FD (kokinbredado) : vakas.

MEMBRO-SUBTENANTO 1958

536 Maciel, S-ro J. Couto, Salvador, Brazilo.

MEMBROJ SUBTENANTOJ 1959

329 Jung, S-ro Teo, Scheveningen, Nederlando.

330 Engen, S-ro Per, Drammen, Norvegujo.

331 Falch, S-ro Aage, Kragerø, Norvegujo.

332 Jensson, S-ro Arnfinn, Oslo, Norvegujo.

333 Ringstad, S-ro G., Torp, Norvegujo.

334 Rosbach, S-ro Hans Amund, Hasvik, Norvegujo.

335 Zieba, S-ro Jozef, Bochnia, Pollando.

336 Amaral, S-ro Inğ. Hugo, Funchal, Portugalujo.

337 Rego, S-ro M. Lopes do, Lisboa, Portugalujo.

338 Ahlgren, S-ro A., Göteborg, Svedujo.

339 Ahlin, S-ro E. V., Brovallen, Svedujo.

340 Almén, S-ro Helmer, Stockholm, Svedujo.

341 Almén, S-ro P., Hällefors, Svedujo.

342 Andersson, S-ro Lars, Hoje, Svedujo.

FONDAJO ZAMENHOF

Antaŭa sumo : 11.637,78.

Buenos Aires Esp. Asocio 7.- gld., Argentino; J. Kosutek 27.50 gld., Aŭstralio; Franz Nawratil 1.46 gld., J. G. Kudrjaricky 1.46 gld., S-ino Ile Wilfar 0.73 gld., S-ino Minauf 0.73 gld., S-ino R. Marco 4.52 gld., V. Hollerer 1.75 gld., Dir. Puntigam 5.84 gld., Josef Eder 2.19 gld., Josef Schmeller 4.75 gld., Aŭstrujo; H. Audenaert 2.23 gld., Ges. Herion 18.60 gld., S-ino M. Vandeveld 37.20 gld., Belgujo; Francisco Ferreira de Sousa 1.39 gld., Brazilo; O. Christensen 8.20 gld., R. kaj V. Kvist 5.45 gld., E. S. 13.65 gld., H. Tobiesen 10.90 gld., André Skovrind 5.45 gld., Danlando; E. A. Karjalainen 23.- gld., Toivo Ojanen 5.50 gld., Kalle Huuskonen 2.30 gld., Finnlando; S-ino Ressort 3.85 gld., Grupo Roanne 6.93 gld., J. Delacourt 3.85 gld., Francujo; F-ino Maria Grabau 6.77 gld., Erwin Richter 4.51 gld., Kurt Schönrich 9.02 gld., Esp. Ekzamen Komisiono Wiesbaden 6.77 gld., Walter Walther 13.53 gld., Harry Wilke 9.02 gld., Germanujo; Manuel Poblete 1.44 gld., S. Martinez 1.44 gld., José Gutierrez 1.80 gld., Esto 3.74 gld., Bartolomé Serra 1.80 gld., Ricardo de Luna 1.44 gld., Grupo Aŭroro 1.80 gld., F. Vilà 1.80 gld., F. Abella 0.72 gld., P. Maldonado 0.72 gld., A. Bohigas 1.44 gld., Hispanujo; S-ino Ch. Sj. Datoe Toemenggoeng 17.50 gld., Indonezio; D-ro Th. Thorsteinsson 8.50 gld., Islando; F-ino Elsa Borzatta 3.- gld., S-ino Anna Corradi 3.- gld., V.E.K.O. 6.- gld., Gavino Nurra 1.- gld., Giulio Viti 3.- gld., Italujo; Esp. Grupo Z.E.T.-Zagreb 30.- gld., D-ro Kalman Kovacs 12.- gld., Jugoslavio; G. Ates 5.- gld., J. M. J. Driesen 5.- gld., K.U.N.E.-Sekcio 10.- gld., N.N. en V. 10.- gld., Nederlando; Leonel Augusto da Cruz 2.64 gld., Portugalujo; Stellan Engholm 10.93 gld., Motala Esp. Klubo 7.29 gld., Agda Olsson 29.14 gld., Esperanto-Societo de Gotenburgo 18.21 gld., Svedujo; F. Conchado 4.71 gld., S-ino L. Berthold Schmidt 55.56 gld., George Saville 7.54 gld., Charles Powell 3.77 gld., N.N. en San Diego 126.85 gld., Adolf Holzhaus 10.- gld., S-ino Dean C. Walker 10.41 gld.

Entute 12.313.02 gld. je 1.4.1959.

Donacu unu milonon — aŭ pli! — de viaj jaraj enspezoj por tiu ĉi gravega celo!

DONACO AL ĜENERALA KASO

N.N. en V., Nederlando 5.— gld.

DONACOJ AL OFICEJA ILARO

N.N. en V., Nederlando 5.— gld.; Esp. Soc. ZET-Zagreb, Jugoslavio 2.46 gld.

DONACOJ AL A.P.O.

D-ro F. J. Williams, Aŭstralio 73.50 gld.; F. W. Ebner, Aŭstrujo 1.45 gld.; J. W. Chambers, Britujo 11.18 gld.; N.N. en V., Nederlando 5.— gld.

Al ĉiuj donacintoj tre koran dankon.

M. H. Vermaas,
Direktoro C.O.

ANONCETOJ

La Navigantoj. Örebro, Svedujo, invitas vin partopreni senkoston korespondan kurson pri la kristana kredo. Kontraŭ respondkuponon - se havebla - vi ricevos belaspektajn prospekton kaj unuan lecionon.

Londona gastejo, agrabla loĝloko. Lito kaj matenmanĝo po 14 ŝ. 6 p. por ĉiu nokto. Prezoj malaltiĝas laŭ loĝdaŭro. Oni parolas Esperanton kaj la francan. D. Bytheway, "Flat Four", 1, Warrington Crescent, London W. 9, Britujo. Telefono Cunningham 4487.

Katolika Esperantisto! Ĉu vi jam estas membro de Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE)? Jarkotizo ned. guld. 6.- = 24 steloj aŭ egalvoloro. Membroj ricevas la monate 20-paĝan Esperanto-revuon ESPERO KATOLIKA. Informojn donas la Administracio de IKUE: Frederikstraat 2, Dordrecht, Nederlando.

Pola Geedziga Oficejo havas kiel celon (speciale por geesperantistoj) feliĉege helpi al soluloj kaj diskrete kunigi esperantistajn geedzojn. Skribu al: "Swatka", Łódź, Piłsudska 133, Polujo. Aldonu respondkuponon.

Esperanto-Civito, Dover. Fondaĵo staras je 7 anglan pundoj. Donacoj afable al konto de S-ro N. H. Smith ĉe U.E.A.

Labortendaro en la Vegetara Kolektivo "Nova Mondo" sur insulo en orienta Svedujo. Helpa servo por ĵus komen-cinta porpaca movado. Vegetara manĝaĵo. Interesuloj povas partopreni dum mallonga aŭ pli longa tempo de la komenco de aprilo ĝis la fino de novembro. Por pluaj informoj skribu al Gunnar Rugland, Pl. 372, Färjestaden, Svedujo.

Nederlandanino deziras korespondi kun sinjorino, prefere ekster Eŭropo pri ĉiutaga vivo, plantoj, bestoj ktp. S-ino Driesen, Sam. Mullerstraat 7a, Rotterdam 6, Nederlando.

Katolika Lernejo en Hindujo volonte ricevas infandeseĝnaĵojn el Francujo, Germanujo kaj Hispanujo. Helpu konatigi nian lingvon kaj ĝiajn servojn. Sendu tre baldaŭ aerpoŝte al: S-ino Haudebine, c/o Ambassade de France, 2 Aurangzeb Road, New Delhi, Hindujo/India.

Interesiĝas pri ĉiaj Esperantaj filatelajoj. E. Gil, Apartado 875, Barcelona, Hispanujo.

La Junulara Sekcio de Grupo Esperantisto de Stockholm deziras interŝanĝi ilustritajn poŝtkartoj kun la tuta mondo. Skribu al la sekretariino fraŭlino Berit Karlsson, Ahlsellvägen 14, Stockholm No., Svedujo.

Deziras korespondi Burlingame Esperanta Klaso (infanoj kaj plenkreskuloj) 410 Darrell Road, Burlingame (Hillsborough) Kalifornio, Usono.

Vizitu Bonn, la belan urbon ĉe la Rejno. Informojn, prospektojn gvidistoj, ĉambroperadon per la Städtische Verkehrsamt, Poststr. 27/29, Bonn, Germanujo.

39-jara virino, Anna Siwińska, Barkowo 1, pow. Milicz, Wrocławskie, Pollando, deziras korespondi tutmonde per poŝtkartoj kaj leteroj interŝanĝi librojn kaj revuojn pri diversaj temoj.

Helpu al Internacia Ekspozicio de infandeseĝnaĵoj okazontan en ĉefaj urboj de Japanio. Kansai Ligo de Esperanto-Grupoj: Nakatu-hamadōri, Ooyodo-ku, Osaka.

Svedujo. La tuta mondo! Ni plimultigu la scion pri diversaj fakoj kaj la belartoj tra korespondado. S-ino Astrid Granlōf, Hagavägen 22 C, Skönsberg.

Geinstruistoj! Instigu viajn klasojn fari kaj antaŭ 1 sept. 1959 sendi infandeseĝnaĵojn pri la vivo de la infanoj al grandega ekspozicio aranĝota de Mondfederalistoj, UN-asocioj kaj Lunds Esperanto-Klubb. Adreso: Erik Dahlbergsgatan 3 B, Lund, Svedujo.

La urbeto Bugeat (1.100 loĝantoj) (Corrèze) Francujo, deziras ĝemeliĝi pere de la internacia lingvo Esperanto kun alia Eŭropa urbeto 1.200 ĝis 2.000 loĝantoj. Ĉiuj interesataj urbestroj bonvolu skribi rekte al S-ro Tatet Guy, Rue Nationale, Bugeat (Corrèze), Francujo. Ni ekzamenos atenteme ĉiujn kandidatecojn.

Rilatlante kun UNESKO, denove L.I.C.S. starigos laborkampojn en diversaj landoj. Krom la okazo renkonti homojn de malsimilaj devenoj, vi plenumos utilan agon al la homaro. LICS, 77 bd. J. Jaures, Clichy, Seine, Francujo.

Komencantoj deziras korespondi kun komencantoj en Italujo, Francujo, Pollando, Germanujo kaj Cejlono. Skribu al D. Fulton, 41 Florence St., Fullarton, Sud Aŭstralio.

Letervesperon aranĝos la "Zamenhof" esperanto grupo la 30-an de majo. Bonvolu sendi bildkarton, eble koloran! Skribu amase al adreso: "Esperanto", Békéscsaba, I Bánát 26, Hungarujo.

Milanaj gelernantoj bezonas ĉies instigon kaj entuziasmigon ankaŭ per bildkarto. Ni petas precipe la esperantistojn kiuj foje kontaktiĝis kun Milananoj aŭ Italoj. Bonvolu skribi kaj pruvi ke nia lingvo interamikigas kaj alproksimigas popolojn. Geamikoj, ni atendas tutmondajn bildkartojn. Esperanto-Kurso, Piazza Oberdan 1, Milano.

Deziras korespondi kaj interŝanĝi poŝtmarkojn kun seriozaj kolektantoj tutmonde kvanto kontraŭ kvanto. Respondo certa. Skribu Luigi Toma, Via Nuoro 58, Cagliari, Italujo.

Korespondi pri diversaj temoj kaj, interŝanĝi poŝtmarkojn en kompletaj serioj deziras: May-Rjamski Otton, Gdynia, Swietojańska 62 m 4, Pollando.

Jugoslavio. Korespondi kun samideanoj en ĉi-tiu lando deziras S-ro Uut Medema, Assendorperstr. 274, Zwolle, Nederlando.

Vera Tipografia Juvelo, estas la jubilea numero de NIA VIVO, eldonita de Grupo "Frateco" el Zaragozo, solenigante la Oran Jubileon de ĝia fondiĝo. 20 paĝoj de tre interesa enhavo, kun bela kvinkolora kovrilo. Ricevebla kontraŭ 3 resp. kup. el Esperanta Societo Frateco, S. Vicente Paul 1. Zaragoza, Hispanujo.

19-jara ĉeĥoslovaka studento deziras korespondi pri ĉio, kio estas bela. Nepre respondas. Jindra Palán, Větrný Jenikov 57, oh. Humpolec, Ĉeĥoslovakio.

K.E.S. Sekretario sendos broŝuron por unu I.R.K. "William Penn", "George Fox", "La Societo de Amikoj". Bath Road, Ventnor, I.W., Britujo.

Adresaro 1959: Entreprenoj Esperanto-parolantaj, — Turisma Interpretisto Esperanto — franca. Ĉe libroservoj kaj S-ro Rétot, 162 Boulevard A. Briand, Montreuil (Seine), Poŝtkonto Paris 1042-07: po 3 rpk aŭ 140 fr.fr.

Ibra Radio, kiu sendas el Tanger, Afriko, havas Esperantan programon la lastan mardon de ĉiu monato je 20.15 horo mezeŭropa tempo. Ondlongoj 32,5 m, 26,1 m kaj 20,2 m. Ibra sendas en multaj lingvoj. Aŭskultu kaj skribu en Esperanto al Ibra Radio, Stockholm 1, Svedujo.

Estu vaste uzataj:

ZAMENHOF-POŜTKARTO, portreto, 0,20 gld., 0,80 st.;

ZAMENHOF-BILDO laŭ gravuraĵo, 21 × 27 cm., vidu p. 7 Jarlibro 1959, 3 resp. kup. afrankite;

ZAMENHOF-GLUMARKO jubilea, folio po 25 ekz. 0,15 gld. 0,60 st. plus sendkostoj.

12 FOTO-AFIŜOJ DE U.N.E.S.C.O.

kun Esperanto-teksto
memorige al la Deklaracio pri la Homaj Rajtoj
Eldonis U.N.E.S.C.O.
Sendas U.E.A. kontraŭ 4 resp. kup. aŭ 5 steloj.

BONVENA DONACO POR NOVAJ MEMBROJ!

GASTRONOMIA TERMINARO

de Erhard Urban
en lingvoj esperanta, angla, ĉeĥa, franca. 128 p.
Prezo: 3,25 gld, 13 steloj
MENDU TUJ ĈE U.E.A.

BELARTO

unika kajero pri:

LITERATURO

PENTRARTO

MUZIKO

LINGVISTIKO

Prezo: 2,75 gld. (11 steloj) por membroj
3,25 gld. (13 steloj) por nemembroj
72 p. Mendu ĝin tuj ĉe U.E.A.

ANGLA ANTOLOGIO

1000-1800

Unika verko pri grava literaturo
Redaktis: William Auld kaj Reto Rossetti
Eldona Fakto de U.E.A.
Prezo: 10.- gld.; 40.- steloj
Mendu ĉe U.E.A.

Bela Libro por via Biblioteko

"MIKSPOTO"

La unuaj 5 numeroj de "Nova Libro"
Eldono de Serbia Esperanto-Ligo. Terazije 42,
Beograd, Jugoslavio

TOLE BINDITA KUN ORA SURSKRIBO

Enhavo :

- 1) Provinca gastejo - originala novelo de B. Trudić
- 2) Du noveloj - originale de B. Radaković
- 3) "Analfabeto" kaj "Butono" - unuaktaj komedioj de B. Nušić en traduko de B. Trudić
- 4) Suspektinda Persono - komedio de B. Nušić en traduko de A. Sekelj
- 5) Rakontoj el la naciliberiga batalo de jugoslaviaj popoloj - kolektitaj kaj tradukitaj de A. Sekelj

Ĉiuj favore recenzitaj en la Esperanta gazetaro
PREZO 1,30 US dolaroj aŭ egalvaloro

Havebla ĉe nia libroservo aŭ ĉe la eldonejo.


FELIĈAJ KULTURAJ FERIOJ

ESPERANTO KAJ GEONISMO

KASTELO MÜNCHENWILER

apud Murten-Morat, Svislando 9-23 aŭgusto 1959

Dir : D-ro W. Perrenoud, Prof. Prospekto kaj informoj ĉe : Svisa Esperanto-Instituto, Breitenrainstrasse 12, BERN.



1 = karuselvojaĝo
2 = la publiko
3 = la esperanto movado

La karuselvojaĝo estas tutnova sistemo de vojaĝo precipe por esperantistoj. Ĝi estas tre alloga pro siaj avantaĝoj por la partoprenantoj, por la propagando kaj por la Esperanto-movado entute.

Petu prospekton 1959 (Amsterdam-Köln-Wiesbaden - Luxemburg - Bruxelles - Amsterdam) ĉe la peranto :

Hans Bakker, v. Tuyll v. Serooskerkenplein 33, Amsterdam-Z. (Nederland).

Provizora Eksport - Importo

UA, LB 6 A SSS VAXJÖ SVEDIO

MANUFAKTUR-

KAJ SLOJD-PRODUKTAĴOJ

PENTRILOJ TURISTAJ AFEROJ

Ĉiuj rajtoj rezervitaj.

la nica literatura revuo

sub ĉefredaktoreco de

Prof. G. Waringhien

kun kunlaborado de la plej famaj verkistoj
aperas ĉiun duan monaton

32/40 paĝa - - poŝformato jare fr. fr. 400.- aŭ
egalvaloro

Ricevas la abonojn :

En Francujo : R. Fiquet, Poŝta konto 2259-98
Marseille

Alilande : Ĉiuj Ĉefdelegitoj kaj landaj Perantoj
de UEA

PETU SENPAGAN SPECIMENON

Redakcio:

7. Av. Léon-Gourdault 5. Bd. Stalingrad
Choisy-le Roi (Seine) Nice (A-M)
Francujo.

Administracio:

RETORIKO

kun aparta konsidero al esperanta parolarto

de

IVO LAPENNA

Dua Eldono reviziita kaj kompletigita

Eldono de la aŭtoro

Prezo : 11.— gld. bindita

44.— steloj

9.— gld. broŝurita

36.— steloj

Mendu ĉe U.E.A.

aŭ ĉe la aŭtoro



Dezirinda posedaĵo por ĉiu esperantisto.

Presita en Nederlando ĉe Zwagers, Rotterdam